

Gaza-konflikto: Nu, karaj fratoj...



**Novjaraj  
pensoj**

**Punoj pro fuŝa  
lingvo**

**Burundo:  
paco – post 13 jaroj**

# Plej furoris en 2008



## Ĉu vi jam legis?

1. Ziko van Dijk: La Asocio
2. Wendy Heller: Lidia
3. Stephan Lang: La talpočasisto
4. La Jaro 2009
5. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
6. Edwin de Kock: Sub fremdaj ĉieloj
7. Katalin Kovacs: Poŝamiko
8. Petro De Smedt: Zakwoordenboekje/  
Poŝvortareto Esperanto-Nederlands-Esperanto
9. Lea Karpunina: Neokazinta amo
10. Ziko van Dijk: Informado praktike
11. Stefan MacGill: Nemave edifi
12. Ludoviko Zamenhof: Fundamento  
de Esperanto (hungara)
13. Alberto Fernandez: Kalejdoskopa rememoro
14. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo
15. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni (2a eldono)
16. Sen Rodin: Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj  
rakontoj
17. Ilustrita oficiala radikaro
18. Petro De Smedt: Nederlands Esperanto  
Nederlands
19. Marcus Sikosek: Esperanto sen mitoj
20. Hergé: Tinĉjo en Tibeto
21. Anna Löwenstein: Morto de artisto
22. Hergé: La Nigra insulo
23. Sagao de Njal
24. Sten Johansson: Krimo de Katrina
25. Andrzej Pettyn: Humuro laŭ la skota  
maniero

La jenaj 25 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2008.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net), sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



## Skuas skandaloj

En septembro 2008 okazis en Slovenio ĉefbalotoj post kvarjara mandato, en kiu dekstra koalicio regis sub gvido de Slovena Demokratia Partio (SDS), kiun prezidas Janez Janša. Li sukcese gvidis la registaron, kaj Slovenio ekonomie progresis en tiu periodo. Slovenio ankaŭ sukcese gvidis Eŭropan Union en la unua duono de 2008.



8

## Punoj pro fuŝa lingvo

15

Kialo de la leĝpropono estas „malaltiĝo de la lingva kulturo”. Tiu, laŭ la ministerio, manifestiĝas – krom en pekado kontraŭ gramatikaj kaj ortografiaj reguloj en la slovaka lingvo – ankaŭ per troa uzado de fremdaj vortoj. Kulpas precipe anglismoj kaj usonismoj kaj ilia superflua uzado ankaŭ tie, kie por la vortumo ekzistas konvena hejmlingva esprimo.

## Novjaraj pensoj

18



La novan jaron 2009 mi festis monde. Mi sidis kun la edzino en nia loĝejo antaŭ la televido. Kabla televido proponas 70 programojn, kaj ni serĉis ion interesan por spekti. De tempo al tempo mi rigardis mesaĝojn en komputilo. Sur tablo estis skota viskio, vino el Montenegro, porkidaĵo el Serbio, kaj por la novjaro mem preitis ĉampano el Francio.

## De mielo al malfeliĉo

20



La milito en Burundo inter 1993 kaj 2005 kaŭzis financajn, homajn kaj materialajn damaĝojn. Burundo, antaŭe nomita lando de lakto kaj mielo, iĝis lando de sufero kaj malfeliĉo. Aparte suferas infanoj.

FOTO DE LA KORBLO: EL CLINTO

### politiko

|                                       |    |
|---------------------------------------|----|
| <b>SLOVENIO</b> .....                 | 8  |
| Skuas skandaloj .....                 |    |
| <b>ALBANIO</b> .....                  | 9  |
| Striko malsata – aŭ ĉu memŝata? ..... |    |
| <b>BELGIO</b> .....                   | 9  |
| Savintoj ne savitaj .....             |    |
| <b>GAZA-KONFLIKTO</b> .....           | 10 |
| Nu, karaj fratoj ... ..               |    |
| <b>ALBANIO</b> .....                  | 11 |
| Fi-no .....                           |    |
| <b>BURUNDO</b> .....                  | 12 |
| Malsana servo .....                   |    |
| <b>DR KONGO</b> .....                 | 12 |
| Murdoj kaj buĉadoj .....              |    |
| <b>BURUNDO</b> .....                  | 13 |
| Paco – post 13 jaroj .....            |    |

### moderna vivo

|                                          |    |
|------------------------------------------|----|
| <b>NOBELPREMIO</b> .....                 | 14 |
| Testamento testata .....                 |    |
| <b>SLOVAKIO</b> .....                    | 15 |
| Punoj pro fuŝa lingvo .....              |    |
| <b>JAPANIO</b> .....                     | 16 |
| Malsana sistemo .....                    |    |
| <b>JAPANIO</b> .....                     | 16 |
| Premioj – kaj premoj .....               |    |
| <b>PSIKOLOGIO</b> .....                  | 17 |
| Retturmentado subtakita .....            |    |
| <b>ALBANIO</b> .....                     | 17 |
| Dato-debato .....                        |    |
| <b>OPINIO</b> .....                      | 18 |
| Novjaraj pensoj .....                    |    |
| <b>BURUNDO</b> .....                     | 19 |
| Pendole pedale .....                     |    |
| <b>KULTURO</b> .....                     | 19 |
| Kanonoj, kanzonoj .....                  |    |
| <b>INFANOJ</b> .....                     | 20 |
| De mielo al malfeliĉo .....              |    |
| <b>BALKANIO</b> .....                    | 21 |
| Albanaj edzinoj por serbaj fraŭloj ..... |    |
| <b>KRIMADO</b> .....                     | 21 |
| Pilorio senpolica .....                  |    |
| <b>BELECKONKURSO</b> .....               | 21 |
| Fraŭlino Paco .....                      |    |

### turismo

|                            |    |
|----------------------------|----|
| <b>ĈEHIO</b> .....         | 22 |
| Nova Esperanto-muzeo ..... |    |

### spirita vivo

|                                                 |    |
|-------------------------------------------------|----|
| Ĉu vera katoliko? .....                         | 23 |
| <b>TEOZOFIO</b> : Spirituala materialismo ..... | 24 |

### libroj

|                         |    |
|-------------------------|----|
| Malkovru Napolon! ..... | 26 |
|-------------------------|----|

|                                        |    |
|----------------------------------------|----|
| › Abonoj .....                         | 4  |
| › Enkonduko .....                      | 5  |
| › El mia vidpunkto .....               | 7  |
| › Rezultoj de la Monato-konkurso ..... | 23 |
| › Anoncetoj .....                      | 27 |

## ► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.  
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.  
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.  
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.  
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.  
 > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).  
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.  
 > Per Paypal al konto [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be)  
 > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.  
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto |     | MONATO  |      |       | LA JARO aere |          |
|---------------------|-----|---------|------|-------|--------------|----------|
|                     |     | surface | aere | rete  | 3a klaso     | 1a klaso |
| Argentino           | EUR | 24      | 27   | 14,4  | 5            | 9        |
| Aŭstralio           | AUD | 87      | 92   | 52,2  | 9            | 17       |
| Aŭstrio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Belgio              | EUR | 49      | 58   | 29,4  | 5            | 9        |
| Brazilo             | EUR | 24      | 27   | 14,4  | 5            | 9        |
| Britio              | GBP | 39      | 42   | 23,4  | 4            | 7        |
| Bulgario            | EUR | 26      | 29   | 15,6  | 5            | 9        |
| Ĉeĥio               | EUR | 34      | 37   | 20,4  | 5            | 9        |
| Danio               | DKK | 366     | 396  | 219,6 | 40           | 70       |
| Estonio             | EUR | 26      | 29   | 15,6  | 5            | 9        |
| Finnlando           | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Francio             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Germanio (ok.)      | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Germanio (or.)      | EUR | 46      | 50   | 27,6  | 5            | 9        |
| Grekio              | EUR | 46      | 50   | 27,6  | 5            | 9        |
| Hispanio            | EUR | 46      | 50   | 27,6  | 5            | 9        |
| Honkongo            | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Hungario            | HUF | 6950    | 7750 | 4170  | 1340         | 2410     |
| Irlando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Islando             | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Israelo             | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Italio              | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Japanio             | JPY | 7980    | 8500 | 4788  | 860          | 1460     |
| Kanado              | CAD | 76      | 80   | 45,6  | 9            | 15       |
| Kipro               | EUR | 34      | 37   | 20,4  | 5            | 9        |
| Koreio              | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Kostariko           | EUR | 24      | 27   | 14,4  | 5            | 9        |
| Kroatio             | EUR | 26      | 29   | 15,6  | 5            | 9        |
| Latvio              | EUR | 26      | 29   | 15,6  | 5            | 9        |
| Litovio             | EUR | 26      | 29   | 15,6  | 5            | 9        |
| Luksemburgo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Malto               | EUR | 34      | 37   | 20,4  | 5            | 9        |
| Nederlando          | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |
| Norvegio            | NOK | 398     | 430  | 238,8 | 45           | 73       |
| Nov-Zelando         | NZD | 105     | 110  | 63    | 11           | 19       |
| Pollando            | PLZ | 99      | 110  | 59,4  | 22           | 36       |
| Portugalia          | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Rusio               | EUR | 24      | 27   | 14,4  | 5            | 9        |
| Singapuro           | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Slovakio            | EUR | 26      | 29   | 15,6  | 5            | 9        |
| Slovenio            | EUR | 34      | 37   | 20,4  | 5            | 9        |
| Sud-Afriko          | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Svedio              | SEK | 466     | 499  | 279,6 | 49           | 86       |
| Svislando           | CHF | 82      | 88   | 49,2  | 9            | 15       |
| Tajvano             | EUR | 42      | 45   | 25,2  | 5            | 9        |
| Usono               | USD | 78      | 82   | 46,8  | 8            | 14       |
| Baza tarifo         | EUR | 49      | 53   | 29,4  | 5            | 9        |

## ► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: [libroŝerbo@esperanto.org.au](mailto:libroŝerbo@esperanto.org.au).  
 > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: [leopold.patek@esperanto.at](mailto:leopold.patek@esperanto.at).  
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).  
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br).  
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: [eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org).  
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz).  
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: [arne-casper@email.dk](mailto:arne-casper@email.dk).  
 > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: [virveernits@hotmail.ee](mailto:virveernits@hotmail.ee).  
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: [eafofficejo@esperanto.fi](mailto:eafofficejo@esperanto.fi).  
 > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: [esperanto-france@esperanto.org](mailto:esperanto-france@esperanto.org).  
 > **Germanaj:**  
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: [robo.espero@acn-mail.de](mailto:robo.espero@acn-mail.de).  
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: [HDP@internacia-festival.de](mailto:HDP@internacia-festival.de).  
 > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: [wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de](mailto:wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de).  
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).  
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: [abonasoft@gmail.com](mailto:abonasoft@gmail.com).  
 > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.  
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: [novire-sp@eircom.net](mailto:novire-sp@eircom.net).  
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: [esperant@ismennt.is](mailto:esperant@ismennt.is).  
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: [f.esp.it@infinito.it](mailto:f.esp.it@infinito.it).  
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzjuku-ku, Tokio 162. [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp).  
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a

Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: [yan@storm.ca](mailto:yan@storm.ca).  
 > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: [kea-kasisto@esperanto.cat](mailto:kea-kasisto@esperanto.cat).  
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: [esperanto@saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net).  
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: [miaumiau1@ice.co.cr](mailto:miaumiau1@ice.co.cr).  
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: [mbelosev@public.srce.hr](mailto:mbelosev@public.srce.hr).  
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: [Margarita@rsu.lv](mailto:Margarita@rsu.lv).  
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: [laimiuslt@gmail.com](mailto:laimiuslt@gmail.com).  
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: [esper\\_lu@geocities.com](mailto:esper_lu@geocities.com).  
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: [uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net).  
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: [inform@esperanto.no](mailto:inform@esperanto.no).  
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz).  
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: [dankal@epf.pl](mailto:dankal@epf.pl).  
 > **Ruslandaj:**  
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: [sezonoj@gazinter.net](mailto:sezonoj@gazinter.net).  
 > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: [mikaelo@km.ru](mailto:mikaelo@km.ru).  
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: [zciric@eunet.yu](mailto:zciric@eunet.yu).  
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: [cbec-kford@telkomsa.net](mailto:cbec-kford@telkomsa.net).  
 > **Svedaj:**  
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: [persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com](mailto:persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com).  
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: [bertil.andreasson@horby.mail.telia.com](mailto:bertil.andreasson@horby.mail.telia.com).  
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch).  
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: [elna@esperanto-usa.org](mailto:elna@esperanto-usa.org).

# Malĝustaj aŭtoj



**E**n la novembra numero de 2008 mi atentigis pri la malavantaĝoj de grandaj aŭtoj laŭ pluraj aspektoj (*Katastrofaj ciferoj*, p. 7). Tiam temis precipe pri damaĝoj, kiujn ili kaŭzas por la klimato. Kiam antaŭ duona jaro mi verkis tiun artikolon, mi ne imagis, ke tiel rapide la aŭtomobil-industrion kaptos giganta krizo ĝuste pro aŭtoj tro grandaj kaj pezaj, kiuj konsumas multan karburadon. Nun tutmonde, sed precipe en Usono kaj partoj de Eŭropo, aŭtomobilproduktistojn de grandaj veturiloj minacas bankroto. Tion kaŭzis inter aliaj la terure kreskintaj prezoj de karburadoj meze de 2008. Sekve homoj ne nur evitis superflujajn veturojn, sed ankaŭ grandajn aŭtojn: oni ne plu aĉetas ilin, kaj se oni entute aĉetas novan veturilon, oni kutime elektas etajn aŭtojn, kiuj bezonas malmultan karburadon. Ĝiaj prezoj intertempe falis, sed homoj tamen hezitas, sciante, ke baldaŭ la prezoj denove povos kreski – naftofontoj ja ne fluos ĉiam. La aŭtokrizo alarmis registarojn, ĉar la kompanioj anoncis, ke ili devos amase maldungi laboristojn, kio krome akriĝos la nunan ekonomian krizon. Do politikistoj donacas al la aŭtoindustrio miliardojn por savi ilin, miliardojn el niaj impostpagoj!

Ĉu estas la ĝusta vojo? Ĉu vere tiamaniere ni pardonu la erarojn de aŭtomobilkompanioj? Ili mem kulpas pri sia krizo, ĉar dum jardekoj ili sciis pri la problemoj, tamen daŭre konstruis la malĝustajn aŭtojn. Nun subite oni fervore serĉas alternativajn energiojn por la veturiloj, kion oni konstante neglektis dum pasinteco. Oni ne volis elspezi monon por esplorado, sed nur enspezi per vendado. Se ili ne rapide trovos solvon, eble tio signifos finon de individua aŭtomobilismo. Kaj ĉu tio estus terura? Dum jarmiloj la homaro ne havis aŭtojn, ankaŭ nun miliardoj da homoj ne disponas pri ili. Ĉu pro tio iam kaj nun homoj estis kaj estas malfeliĉaj? Kaj ĉu estus katastrofo, se komplete malaperus la aŭtomobilindustrio? Jam ofte malaperis kompletaj metioj kaj industrioj, tamen la homaro plu vivas. Laboristoj perdintaj siajn postenojn trovis aliajn. Probable ja ne tute malaperos aŭtomobiloj, sed ili aŭ estos aliaj aŭ servos precipe por publika trafiko; individue ni povas bicikli, kio estas multe pli bona por sano kaj medio.

Sincere via

*Stefan Maul*

Stefan MAUL

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.  
100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

## eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

## ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

## revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

## redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

## grafiko:

Julia Litvinova.

## redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmaj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.  
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Clevelend Heights, OH 44118, Usono.  
Telefono/faksilo (216) 297-0370.  
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzon oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.  
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.  
Rete: moderna\_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.  
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14<sup>th</sup> St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.  
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.  
Rete: spirita\_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco\_kaj\_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.  
Rete: turismo@monato.net.



## Israelo 60-jara (11)

En sia interesa artikolo pri evoluo de Israelo Josef Ŝemer tute preterlasis la palestinan problemon, kaj tio provokis logikajn reagojn. Kiel popolo kiel la juda, kiu tiom suferis dum sia tragika historio, povas tiom suferigi alian popolon, kiu neniel kulpas pri la juda tragedio? Kial Israelo daŭre rifuzas la pacproponon de 2002 de Araba Ligo, en kiu ĉiuj arabaj landoj proponas pacon, tio estas rekonon de la juda ŝtato, malfermon de limoj, interŝanĝojn politikajn, komercajn, kulturajn ktp, kontraŭ la simpla aplikado de la fama rezolucio 242 de Unuiĝintaj Nacioj (evakuo de ĉiuj teritorioj okupitaj dum la milito de 1967 kaj rajto por Israelo kaj Palestino vivi en sekuraj landlimoj)? Tiujn demandojn provas respondi Jean Daniel, franca ĵurnalisto kaj judo devenanta el Alĝerio, en brila eseo *La prison juive* (La juda malliberejo), kie li demandas sin, ĉu judoj havas ion specifan, kio distingas ilin de ĉiuj aliaj popoloj.

La respondo estas jesa, sed la konkludo ankaŭ estas, ke tiu aparta identeco neniel donas al ili rajton humiligi, kolonii kaj kredi sin supera al la internacia juro. Pensi la malon precize estas la „juda malliberejo“. Israelo havas la jenan elekton: vivi sian judecon pozitive, malferme kaj tolereme, en la respekto de la internaciaj leĝoj kaj, laŭ la aŭtoro, de la judaj religiaj tekstoj, aŭ resti en la „malliberejo“ ... kaj vivi en eterna milito.

Éric COLLIGNON  
Terplanedo

**Noto de la redaktoro:** Ĉar pasis sufiĉe da tempo post la apero de la artikolo de Josef Ŝemer, kaj ĉar ĉiu nun havis la tempon por klarigi sian konsenton aŭ malkonsenton, per tiu ĉi letero ni finas la diskuton.

La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

## La nuna financa krizo (1)

Preskaŭ ĉiun atenton kaptas la monda financa krizo (MONATO 2008/12, p. 15-17), tamen, nun en mia lando oni nur multe publikigas artikolojn pri la krizo, sed ĝi ne influas nian vivon. Por eviti la krizon preskaŭ ĉiuj registaroj laboras multe, sed mia vivo estas sama kiel antaŭe, neŝanĝiganta.

Xu Jinming  
Ĉinio

## La nuna financa krizo (2)

Laŭ mi la kaŭzo de la nuna financa krizo estas la nekontrolita kapitalismo, kiu regis en la mondo de la „oraj knaboj“. Nekontrolita kapitalismo egalas al komunismo. En mia lando oni simple atendas kaj ... esperas.

Giorgos PAPOULIAS  
Greko

## La nuna financa krizo (3)

Multege da homoj, kiuj posedis monon, investis kun la espero kreskigi sian kapitalon. Tamen, la mono ja devas veni de ie, ĉu ne? Oni povas sufiĉe bredi kuniklojn, sed monon multobligi ja ne estas eble. Aŭ mi malbone komprenas financon. Ĉiuokaze, mi persone aŭ en mia ĉirkaŭaĵo ne rimarkis grandajn sekvojn. Mi ĉiam diras: mi estas malriĉulo, do mi ne havis monon por investi, sekve ankaŭ perdis nenion. Nu, mi konscias, ke tio estas egoisma penso, ĉar certe ja multaj perdis sian laboron pro la krizo.

Lode VAN DE VELDE  
Belgio

## La nuna financa krizo (4)

Oni ne povas rigardi la aktualan krizon sen ligoj al la periodaj (ciklaj) krizoj de la kapitalismo. Ili estas ne invento de la komunistoj, sed necesa parto de la sistemo. Periodaj krizoj aperas post ĉiuj 7-10 jaroj. La lasta estis fine de

la pasinta jarmilo, estis krevo de interretaj entreprenoj. La krizon komence de la 1990aj jaroj en Germanio la unuiĝo nuligis – sub certaj cirkonstancoj la periodaj krizoj povas malesti.

Oni respondu la demandon: kio estas mono? Laŭ novaj teorioj, mono estas nur valuta unuo en komputilo. Oni povas laŭplaĉe ŝovi monon de unu konto al alia. Pli klasika (kaj laŭ mia kredo ĝusta) teorio diras, ke mono estas „realigita plusvaloro“, pli simple dirante, oni devas produkti varon kaj vendi ĝin. La diferenco inter la kostoj por la produktado de varo kaj ties prezo, do la plialtiĝo de la valoro, naskas monon. La ŝtato do devas kalkuli, kiom da valoro estas realigata en la ekonomio, kaj presigi tian kvanton de mono. Unu el la kaŭzoj por la ciklaj krizoj estas malĝusta rilato inter reale produktata valoro kaj presita mono.

Kaj fine: kiel la aŭtoro skribas, la bankoj uzas la monon plurfoje. Mono, kiu ekzistas nur en komputilo, povas esti ŝovata de unu banko al alia, al tria, al kvara. Kun reala mono tio ne estas farebla: mi havas monon en la mano, aŭ ne. Aĉetante ion, mi donas monon kaj ne povas doni ĝin duan fojon. Evidente la bankoj reciproke donadis kreditojn, ĝis neniuj sciis, kiom da reala mono kovrata de plusvaloro estas en la sistemo. La ŝtatoj ne estas senkulpaj: de jardekoj la monto de ŝuldoj kreskas. La ŝtatoj prenas kreditojn de la bankoj – sed de kie la bankoj prenas la monon? Ili ĝin interŝovas en komputilo.

Iam tiu procezo kolapsas. Ĝi devas kolapsi, ĉar la merkata ekonomio ne permesas senliman misuzon de ekonomiaj reguloj. Do la aktuala krizo okazas ne ĉar la merkato malfunkcias; ĝi estas konsekvenco de merkataj reguloj. La merkato funkcias devige, ĉie kaj ĉie, kaj kiam la amikaro konsistanta el bankoj kaj ŝtatoj misuzas la eblojn de komputila mono, tiam la merkato kadre de la sekva cikla krizo restarigas la necesan ekvilibron inter produktado kaj vendado de varoj unuflanke kaj la kvanto de mono rezultanta el tio aliflanke.

Do mono ne estas detruita dum la krizo. La ŝajne detruita mono neniam ekzistis.

Michael LENNARTZ  
Germanio

# Bruna marĉo

de Stefan MAUL

**E**n decembro 2008 Germanion terurigis atenco ĝis tiam neimagebla. Razkapulo sonorigis ĉe la loĝejo de la policestro de la bavara urbo Passau, apud la german-aŭstra landlimo. Li insultis la policanon per obscenaj dekstrismaj blasfemoj kaj provis murdi lin per tranĉilo. Mirakle la policestro transvivis la atenton, ĉar la tranĉilo je kelkaj centimetroj maltrafis la koron. La krimulo fuĝis kaj ĝis nun, kiam estas verkata tiu ĉi teksto, ne estas trovita.

## Nova dimensio

Per tiu atenco la dekstrisma perforto atingis novan dimension. Novnazioj en Germanio ĝis nun murdis aŭ vundis „nur“ eksterlandanojn, sed nun unuafoje viktimo fariĝis reprezentanto de

la ŝtato; tion Germanio antaŭe konis nur pri la tiama maldekstrisma Ruĝa Arme-Frakcio (RAF), kiu antaŭ pluraj jardekoj sange batalis kontraŭ la ŝtato, murdante oficialulojn. La nuna atenco trafis poliestron, kiu en sia regiono rigore persekutis novnaziojn kaj batalis kontraŭ la ekstremdekstra partio NPD (Nacidemokrata Partio de Germanio). En la retpaĝoj de NPD ofte oni kalumniis la poliestron.

La bruna partio ja estas observata de la (ŝtata) konstituci-protekt servo, kiu konstante karakterizas ĝin danĝera, tamen NPD jam delonge havas deputitojn en pluraj parlamentoj de federaciaj landoj, precipe en orienta Germanio. La bruna sceno fariĝis amasmovado. Al nazi-koncertoj venas centoj, fojfoje miloj da homoj. Ili estas ne nur partianoj de NPD, sed ankaŭ

multaj perfortuloj, kiel la konataj razkapuloj, kiuj brutale persekutas kaj bategas eksterlandanojn kaj murdas iujn (en 2008 preskaŭ ducent). La bruna movado firme enradikiĝis en Germanio.

## En tuta Eŭropo

Ne nur en Germanio. Ekde kiam en la 1980aj jaroj la franca *Front National* (FN) de Le Pen havis konsiderindajn sukcesojn, dekstrismaj partioj en tuta Eŭropo establiĝis kaj stabiliĝis. Ŝtatnivele ili ofte atingas en elektoj inter dek kaj dudek procentojn, fojfoje eĉ pli. Limoj inter dekstraj populismaj kaj radikalaj ideologioj malaperas.

Jen estas ekzemple *Vlaams Belang* en Belgio, populisma partio DF en Danio, *Lega Nord* en Italio, la partio Fidesz en Hungario kaj BZÖ en Aŭstrio. Kio interligas ilin? Estas precipe agitado kontraŭ enmigrintoj, islamofobio kaj polemiko kontraŭ eksterlandanoj, kiujn ili misfamigas kiel propekajn kapojn, kiuj kulpas pri ĉiuj malbonaĵoj.

Ĝis nun tiuj partioj batalis ne kontraŭ demokratio, sed „nur“ kontraŭ ĝiaj valoroj, escepte de FN ne perfortis, ne estis militemaj. Germana NPD estas alia, pli danĝera. Ĝi aliancas kun perfortemaj radikalaj elementoj novnaziaj kaj iliaj sekretaj societoj kaj kamaradaroj. Germanio tiel fariĝis modelo de ligo de dekstraj konservativuloj (kiuj ekzistas en la tuta okcidenta kaj norda Eŭropo) kaj naciismaj revoluciaj grupoj, do brutal-razkapuloj (kiuj ekzistas precipe en orienta Eŭropo). NPD sukcesis krei simbiozon de la du ideologioj – la danĝero estas, ke tio estas modelo por cetera Eŭropo.

## Malpermeso?

En Germanio oni nun diskutas pri ebla leĝa malpermeso de NPD. Unu fojon oni jam provis malpermesi ĝin, sed pro formalaj fuŝoj la tribunalo tiam rifuzis la akuzon. Post la atenco kontraŭ policestro la ŝancoj por atingi malpermeson eble estas pli grandaj. Sed eĉ se NPD malaperus kiel partio, tio sola ne solvos la problemon. Necesas forta kaj fortika socia kaj politika movado kontraŭ naziismo, por konsciigi civitanojn kaj kuraĝigi ilin energie kontraŭbatali por ekstermi la brunan marĉon. ■



En Germanio oni nun diskutas pri ebla leĝa malpermeso de NPD.

SLOVENIO

# Skuas skandaloj

**E**n septembro 2008 okazis en Slovenio ĉefbalotoj post kvarjara mandato, en kiu dekstra koalicio regis sub gvido de Slovena Demokratia Partio (SDS), kiun prezidas Janez Janša. Li sukcese gvidis la registaron, kaj Slovenio ekonomie progresis en tiu periodo. Slovenio ankaŭ sukcese gvidis Eŭropan Union en la unua duono de 2008.

Tamen dum la balotoj la popolo decidis puni al Janša. Kiel ĉiu dekstra registaro, ankaŭ tiu ĉi iom malbonigis la sociajn servojn kaj tro arogante konduktis. Sed antaŭ ĉio al la malsukceso dum la balotoj kontribuis pluraj skandaloj en la lasta periodo.

La plej grava estis tiu pri aĉeto de specialaj armeaj veturiloj. La ministrejo pri defendo decidis aĉeti 130 ok-radajn

ŝirmveturilojn kontraŭ pli ol 250 milionoj da eŭroj de la finna fabriko *Patria*. Montriĝis poste, ke influaj personoj ricevis koruptmonon, kaj la finna televido akuzis rekte la ĉefministron.

## Balotrezultoj

Fine la socialdemokratoj ricevis pli da voĉoj, ol la partio de Janša (iom pli ol 31 %), kaj ricevis la rajton kunmeti koalicion. Post dumonata intertraktado formiĝis kaj en novembro instaliĝis nova registaro, kiun konsistigas kvar maldekstraj partioj: la socialdemokrata (SD), la liberala (LDS), nova partio *Zares* kaj la partio de emeritoj (DeSUS).

Ili kune havas en la parlamento 55 %



*Al la malsukceso de Janez Janša dum la balotoj kontribuis pluraj skandaloj.*

de la parlamentanoj. En opozicio restis tri dekstraj partioj: SDS de Janša, SNS (Slovena Nacia Partio) kaj SLS (Slovena Popola Partio). La nova ĉefministro estas la prezidanto de socialdemokratoj Borut Pahor.

La partio *Nova Slovenio*, parto de la antaŭa koalicio, ne ricevis 4 % de la voĉoj kaj elfalis el la parlamento. Tiun partion nun prezidas Ljudmila Novak, EU-parlamentanino kaj esperantistino. Ŝi esperas, ke la partio sukcesos reakiri statuson de parlamenta partio post kvar jaroj.

Zlatko TIŠLIJAR



*La nova ĉefministro estas la prezidanto de socialdemokratoj Borut Pahor.*



**Kontribuojn pri la politiko  
de via lando sendu  
al [politiko@monato.net](mailto:politiko@monato.net).**



# Striko malsata – aŭ ĉu memŝata?

**M**alsatstrikis albanaj parlamentanoj en novembro por protesti kontraŭ nova leĝo. Naŭ deputitoj de malgrandaj partioj rifuzis forlasi la parlamentejon kaj ekkuŝis sur la plankon, dum ekstere manifestaciis sampartianoj kaj aliaj subtenantoj.

La kialo: la du ĉefaj partioj voĉdonis por leĝo, kiu – laŭ la malsatstrikantoj – nuligus la esperojn de la malgrandaj por okupi lokojn en nova parlamento elektota venontan some-ron.

Fakte la nova leĝo, diskutita kun internaciaj instancoj, unuafoje stari- gos regionan proporcian principon, kiu ebligas pli ĝustan reprezentadon de ĉiuj partioj en la parlamento. Sam- tempe ĝi malhelpas fimanipuladon dum balotado kaj pli precize admini- stros voĉdonadon.

## Luksaĵo

En malgranda Albanio, kun loĝantaro ĉirkaŭ kvarmiliono, agadas aktuale pli ol 40 politikaj partioj, kiujn subvencias la ŝtato. Antaŭ 1991, kiel ĉie en orienta Eŭropo, ekzistis nur unu partio – komunisma. Sed nun tiom da relative malgrandaj partioj estas vera luksaĵo. Multaj celas okupi lokojn en la parlamento por profiti kaj ne por servi. Kiel esprimis sin politikisto el la junularo, Erion Veliaj, eĉ inter la malsatstrikantoj troveblas sep gran- daj aferistoj. Krome la reprezentanto de Eŭropa Unio por Balkanio, Doris Pack, intervjuite de albana televida kompanio, mem diris, ke la malsat- striko estiĝis verŝajne nur pro perso- naj kialoj kaj ne favore al la bono de la lando.

Bardhyl SELIMI



La albana parlamento: la malsatstriko estiĝis verŝajne nur pro personaj kialoj kaj ne favore al la bono de la lando.

# Savintoj ne savitaj



ANNELEEN TOUQUET

Yves Leterme: ĉu laŭleĝa aŭ kontraŭleĝa savanto de multaj investantoj?

**U**nu el la sekvoj de la monda finan- ca krizo (vidu MONATO 2008/12, p. 15) estis la kolapso de *Fortis*, unu el la plej grandaj belgaj bankoj. Por eviti financean katastrofon la belga registaro en septembro aĉetis grandan parton de la banko, tiel ke ĝi iĝis posedanto de 99,93 % de la akcioj. Poste, en oktobro, ĝi vendis 75 % de la akcioj al la banko *BNP Paribas*. La manovro unuavide sukcesis. Ĝi almenaŭ sukcesis kvietigi iomete la financon horizonton kaj savis la situacion.

Juĝistoj tamen deklaris la vendon de *Fortis* al *BNP Paribas* nejusta, ĉar la ŝtato vendis ĝin sen interveno de la akci- uloj. Sekva paŝo do estos aprobo aŭ mal- aprobo fare de la ĝenerala kunsido de *Fortis* en februaro 2009. Sed montriĝis, ke funkciuloj de la ĉefministro intervenis ĉe la juĝistoj, eble kun la celo atingi pli favoran verdikton. Tio ne plu influas la vendon mem, sed estas malrespekto al la konstitucia principo de la apartigo de la povoj: la plenuma povo ne rajtas influi la juĝan povon. Pro tio la pozicio de kelkaj ministroj, inkluzive de la ĉefministro Yves Leterme kaj de la tuta registaro, estis pridemandata, kaj la registaro preferis demisii. Herman Van Rompuy [rompej], la nova ĉefministro taskigita de la reĝo, nun kunmetis novan registaron.

Marc VANDEN BEMPT kaj PAŬL PEERAERTS

GAZA-KONFLIKTO

# Nu, karaj fratoj ...

Al la jena artikolo mi nepre devas antaŭmeti premison, por eviti ian ajn suspekton pri antisemitismo. Kiel zamenhofano-homarano-esperantisto mi profunde respektas la judan etnon (samkiel, ĝenerale, ĉiujn homajn etnojn). Mi ŝatas kaj admiras ĝiajn spirit-etoson, literaturon, muzikon ... humuremon, kaj plene konscias pri la persekutado, kiun ĝi suferis dum du jarmiloj, kaj pri la fakto, ke ĝin afliktis la plej terura amasbuĉado – la holokaŭsto – de la tuta homa historio.

**Ĝ**uste tial, mi estas profunde ŝokata pro tio, kion la juda ŝtatestro de Israelo estas plenumanta, per la enorma forto de sia armeo, kontraŭ la loĝantaro de Gaza, kaj ĝenerale kontraŭ la palestina popolo. Mi substrekas: la israela estraro, ne la judoj. Mi bone scias, ke ankaŭ en Israelo, kiel en la tuta mondo, troviĝas multegaj judoj, kiuj malaprobas kaj kondamnas la politikon de tiu estraro, bazitan nur sur arma forto, la kvara en la mondo.

Ĝuste hodiaŭ (2009-01-07) mi legas la alvokon de Abraham Yehoshua, unu el la plej elstaraj israelaj verkistoj-intelektuloj: „La palestinanoj estas niaj

najbaroj, kaj tiaj ili restos estonte. Tio devigas nin konsideri tre atente la specon de milito, kiun ni faras kontraŭ ili; ĝian karakteron, ĝian daŭron, la kvanton de ĝia perforto. Ni bone agus, se ni plej rapide eligus el nia menso la iluzion, ke ni povas neniigi Hamas-on, ke ni povas elradikigi ĝin el Gaza. Male ni devas labori singarde kaj prudente por atingi tujan militpaŭzon kaj racian-detalan akordiĝon, celante modifon de Hamas. Tio estas ebla kaj atingebla.

## Katastrofaj efikoj

Notindas, ke antaŭ kelkaj tagoj la sama Yehoshua konsideris „neevitebla”



STEVE RICHES

*Kontraŭmilitaj protestoj okazas ĉie en mondo.*

la militan reagon de Israelo kontraŭ la raketoj de Hamas. Evidente la unuaj katastrofaj efikoj de la militago igis lin – racian homecan homon – korekti sian pozicion.

La samo okazas al mi. Mi ne povas forgesi, ke Hamas estas islama organizaĵo esence socihelpa, aganta por sanitara, civila, instrua asistado al la loĝantaro, profunde enradikiĝinta en la palestina socio, analoge kun samspecaj kristanaj organizaĵoj. En 2006 ĝi venkis en la baloto en ĉiuj palestinaj teritorioj okupataj de Israelo (demokrata elekto rekonita kiel valida de UN).

Ĝia elekto fare de la palestina popolo ne montris la islamiĝon de la palestina socio, sed estis la lasta alvoko de popolo fronte al ĉiuj fiaskoj de ĉiuj pac-proponoj. Certe, poste sekvis la krimaj raketoj Kasam kaj Katjuŝa. Sed tiuj raketoj estis la respondo, memleza kaj neakceptebla, al la rompo de la militpaŭzo flanke de Israelo, jam la 4an de novembro 2008.

## Kruela sieĝo

Tion konfesis la ĵurnalo „Haaretz” la pasintan 30an de decembro: atendant la venkon de Obama, Israelo bombadis la tunelojn inter Sinajo kaj Gaza



GROMA.COM

kaj plenumis plurajn „celitajn mortigojn”. Male Hamas estis respektinta la militpaŭzon dum 18 monatoj, malgraŭ la kruela sieĝo de Gaza fare de Israelo, kaŭzinta malsat-tragedion denuncitan de la UN-organizaĵo UNRWA. Tiu mortiga sieĝado estis skandala malobservo de la militpaŭzo, sed nek UN nek Usono diris „ĉesu!”

Kiam homgrupo estas okupata, persekutata, humiligata, ignorata de ĉiuj mondpotencoj, senigata je iu ajn espero, facile ĝi cedas al la allogoj de la perforto. Tiel okazas ĉie kaj ĉiam. Oni devus memori, ke eĉ cionismaj organizaĵoj, luktantaj por la starigo de juda ŝtato, utiligis terorismon. La eŭropaj partizanoj estis teroristoj (banditoj) laŭ la naziaj okupantoj. La irlandaj batalantoj estis teroristoj laŭ la brita ŝtato. La ĉeĉeniaj rezistantoj estis teroristoj laŭ Putin. La tibetanoj estas teroristoj laŭ la ĉina estraro, ktp, ktp.

Certe Hamas ne „rekonas” Israelon kaj predikas la neceson ĝin neniigi. Temas pri propagandaj proklamoj necesaj por la varbado. Ankaŭ Egiptio, Arabio, Jordanio, Sirio proklamis la samajn principojn kaj poste, pere de paciencaj, longaj, kompromisaj traktadoj, ili „rekonis” Israelon. La obstina rifuzo de Israelo trakti kun Hamas estas logike absurda. Pri gravaj, fundamentaj problemoj: kun kiu oni devus trakti, se ne kun la malamiko? Ĉu Israelo taksas Hamas-on malamiko? Do, ĝi devas „traktadi” ĝuste kun ĝi, celante ŝanĝiĝon de ĝia oficiala pozicio.

## Pac-misio

Necesas memori, ke apenaŭ antaŭ ok monatoj la usona eks-prezidanto Jimmy Carter, publikiginte pri la konflikto Israelo-Palestino libron kun la eksplicita titolo *Peace, not Apartheid* (Paco, ne rasapartigo), provplenumis pac-mision en sud-okcidenta Azio, traktante direkte kun Hamas, por eviti novan masakron. Cetere estas ĝenerala scio, ke nur Usono povus ŝanĝi la ĝeneralan kadron. Tion pruvis Bill Clinton per la paco de Camp David inter Arafat kaj Rabin, kiu poste estis murdita de juda fundamentisto, ne



*Mankas akvo, nutraĵo, elektro, medikamentoj; centoj da vunditoj ne povas esti kuracataj.*

de Hamas.

Nu, mi tro bone scias, ke ĉiuj supraj argumentoj povas esti kontestataj kaj renversataj per malaj argumentoj. Sed fronte al ĉiaj dialektikaj rezonadoj restas, roke solida, la realaĵo. La militagado „Fandita Plumbo” estis entreprenita de Israelo por ĉesigi la raket-jetadon de Hamas, kiu dum ok jaroj murdis 10 israelanojn. Nu, dum unu semajno „Fandita Plumbo” murdis 635 palestinanojn, el kiuj almenaŭ 200 civilulojn, inter kiuj dekoj da infanoj; ĝi bombadis moskeojn, lernejojn, hospitalojn; ĝi uzis bombojn el blanka fosforo; ĝi polvigis centojn da loĝejoj, civilaj strukturoj, tutaj kvartaloj; ĝi subpremis per infera lavango el plumbo kaj fajro el aero, maro, tero tutan popolon.

## Infanoj freneziĝas

Tial la Gaza-loĝantaro, laŭ eksplicitaj deklaroj de la Ruĝa Kruco, de la kuracistaj organizaĵoj, de internaciaj observantoj, estas en „katastrofa situacio”. Mankas akvo, nutraĵo, elektro, medikamentoj; centoj da vunditoj ne povas esti kuracataj; la operacioj okazas sen anesteziloj; kaj la infanoj freneziĝas pro timo sub la konstanta frakasbruo de la bombadoj.

Nu, karaj fratoj, judoj, pripensu! Haltu! Kiom ajn justaj estas viaj kialoj, viaj timoj, viaj argumentoj, ne tiamaniere vi pravigos vin. Se vi vere sukcesos neniigi en Gaza Hamas-on kaj restarigi tie la perfidulan estraron de Abu Mazen, la fina efiko estos la jena: tutaj generacioj de palestinanoj ĵurpromesos ekstermi vin; dekobligos en la tuta sud-okcidenta Azio kaj en la tuta mondo malamago kontraŭ vi; vi devos ĉiutage pluvivi minacataj de viaj najbaroj; via vivo estos senripoza ĉiuminuta singardo kontraŭ atencoj; vi ne konos pacon, trankvilon, ripozon.

Unuvorte: infero. Ĉu indas? Amikoj: tiuj, kiuj vin vere, sincere amas, petegas vin: haltu! Oni ne povas dece vivi ĉirkaŭataj de malamo.

Sen Rodin

## ALBANIO

# Fi-no

**L**aŭraporte estis arestita en restoracio en Sarajevo 33-jaraĝa uson-bosnia aferisto, Damir Fazlić. Tiu fariĝis celpunkto de fikampanjo en Albanio, kie opozicianoj diris, ke Fazlić ne nur komplicis kun la registaro en armiltrafikado, sed ankaŭ rilatis kun la murdistoj de la serba ĉefministro Đinđić.

Tamen kelkajn tagojn poste Fazlić aperis en la albana televido, dirante, ke ne li, sed alia aferisto estas arestita en la restoracio. Krome li malkaŝis,

ke li venis al Albanio por korekti fifamojn pri sia konduto.

Li diris, ke li helpis la Demokratian Partion de Albanio reakiri potencon kaj tute morale rilatis kun la nuna registaro. Li atentigis ankaŭ, ke dum kvarjara esploro pri la mortigo de Đinđić eĉ ne unu fojon estas menciita lia nomo. Tiel finiĝis la fikampanjo kontraŭ Fazlić kaj la reganta partio albana.

Bardhyl SELIMI



BURUNDO

# Malsana servo



*Minimumaj servoj.*

**S**trikis pro malbonaj laborkondiĉoj kuracistoj kaj flegistoj ĉe publikaj malsanulejoj en Burundo. Sindikatoj, laborprete vestitaj, venis al siaj hospitaloj, sed rifuzis helpi pacientojn, sidante grupe kaj kolere. Funkciis nur minimumaj urĝec-servoj por viktimoj de akcidentoj kaj por akuŝantoj.

La strikon estigis protestoj kontraŭ la malrapideco de la registaro apliki novan kaj jam subskribitan interkonsenton pri la labor- kaj viv-kondiĉoj de sanserva laboristaro. Kulpas ankaŭ malaltaj salajroj, kiuj ne ebligas al sanfakuloj pagi lukostojn aŭ lernkotizojn de siaj infanoj. En Burundo kuracisto ricevas ĉirkaŭ sesonon, flegisto ĉirkaŭ dudekonon de la salajro de parlamentano aŭ ministro, dum tiuj ofte neniam finstudis kaj eĉ ne vizitadis universitaton.

## Intelektularo

Tiu ĉi malegala divido de salajro fuĝigas eksterlanden la intelektularon. Multaj kuracistoj preferas labori en Ruando, kie ili perlaboras kvinoble pli,



*Hospitalo Princo Regento Karlo.*

ol en Burundo. Aliaj, finstudinte en aliaj landoj, preferas ne reveni al sia hejmlando.

Sindikatoj, konsciantaj la danĝerojn rilate publikan sanon, pardonpetis al la popolo, sed fine kulpigis la registaron. Intertempe multaj malsanuloj serĉas helpon ĉe privataj klinikoj aŭ, pro iliaj altaj kostoj, turnas sin al tradicia medicino. Cetere la striko, la tria en 2008, koincidas kun ĥolero-epidemio en orientaj provincoj de Burundo.

Jérémie SABIYUMVA

DR KONGO

# Murdoj kaj buĉadoj

**D**um longa periodo travivas la provinco Nord-Kivuo en la orienta parto de Demokrata Respubliko Kongo terurajn militojn. Batalas la nacia armeo de DR Kongo kontraŭ la terura militgrupo de eksgeneralo Laurent Nkunda. Subtenas la eksgeneralon la najbara lando Ruando.

Unue la ribelantoj pretendis protekti sian minoritatan etnan grupon, konsistantan el tutsioj. Ili celis ankaŭ rehejmigi eksmilitistojn, kiuj batalis por prezidanto de Ruando mortigita, kiam oni faligis lian aviadilon. Sed nun la nacia armeo ne plu kapablas kontraŭstari la ribelantojn kaj, anstataŭ protekti la popolon, mem prirabas kaj atakas la pacajn civitanojn.

## Nutraĵoj

Hodiaŭ du gravaj distriktoj, Rutsuru kaj Masisi, de kiuj dependas Nord-Kivuo, estas forlasitaj de la armeo kaj tute en la manoj de la ribelantoj. Tio signifas, ke en Goma, la provinca ĉefurbo, prezoj de nutraĵoj duobligis kaj duono de la popolo estas senlabora. La ribelantoj starigis barilojn ekster la vilaĝo Kibumba, 20 km for de Goma, kaj devigas komercistojn, kiuj volas trapasi, pagi pli ol la mezan monatan enspezon en DR Kongo, proksimume 15 eŭrojn.

En la distriktoj teorie „liberigitaj” de la ribelantoj okazas teruraĵoj. Homoj estas buĉataj, virinoj seksperfortataj; suferas ankaŭ infanoj, tiel ke la popolo forlasas siajn hejmojn kaj fuĝas en

la arbarojn aŭ eĉ en najbarajn landojn, ekzemple Ugando kaj Ruando. Multaj restas tamen internaj rifuĝantoj.

## Seksorganoj

Pri teruraĵoj en la parto regata de „liberigintoj” mi povas raporti. Almenaŭ 720 homoj estas amasbuĉitaj en urbeto Kiwajna la 5an kaj la 6an de novembro 2008. Samtage estas murdita la urbeto de Kiringa, Segihobe Joseph: ankaŭ estas murdita en la familia hejmo lia infano. Laŭ onidiroj, post la murdo, la atakintoj fortranĉis seksorganojn kaj langojn.

Ne eblas tion kompreni. Cetere oni demandas sin, kiamaniere la murdintoj iam povos reeniri normalan socion. Kaj ĉio ĉi okazas, dum blukaskuloj de Unuiĝintaj Nacioj, deĵorantaj en DR Kongo, apenaŭ reagas por protekti la popolon. Tio, kion ili faras, estas foti aliajn eventojn por realigi belajn filmojn.

Obs SERVANTO

*La aŭtoro volas resti anonima.*

# Paco – post 13 jaroj

**F**ine eblas esperi, ke baldaŭ ĉesos 13-jara interna milito en Burundo, dum kiu mortis pli ol 300 000 homoj. En decembro 2008 la lasta aktiva ribelanto-grupo, la Nacia Forto por la Liberigo de la Hutu-popolo, kaj la registaro de Burundo konsentis respekti pac-interkonsenton subskribitan antaŭ du jaroj.

Prezidanto Pierre Nkurunziza kaj la ribelestro Agathon Rwaswa anoncis, ke malmarmado rapide komenciĝos. La prezidanto donos 33 politikajn postenojn al membroj de la Nacia Forto pro ĝia rolo en la pacprocezo kaj liberigos ĉiujn kap-

titajn ribelintojn.

Komentis la prezidanto: „Mi gratulas pro la gravaj decidoj, kiujn ni faris, precipe pro la subskribo de la deklaro, kiu lumigas la pacprocezon. Ni deziras, ke la konkludoj estu observataj de ĉiuj.”

## Obstaklo

Nacia Forto estas petita ŝanĝi sian nomon kaj fariĝi politika partio, kion ĝis nun ĝi rifuzis, tiel barante la vojon al paco. Post kvinhora diskuto la ribelintoj promesis forigi ĉi tiun lastan obstaklon kaj ja ŝanĝi la nomon, kio pli akordiĝos kun la nuna konstitucio.

Tio ne estas la unua fojo, ke la registaro kaj la ribelantoj interkonsentis pri paco. Ĉi-foje, tamen, la interkonsento verŝajne eltenos. Laŭ porparolanto de la ribelintoj: „Burundanoj bezonas pacon. Ni devas kombini niajn fortojn por havigi tion al ili.”

## Observantoj

Konsentis eksterlandaj observantoj. La sud-afrika ministro Jeff Radebe opiniis: „Ne estas interkonsento inter la registaro kaj la ribelantoj sed inter burundanoj, kiuj suferas jam delonge. Politika stabileco en Burundo signifas stabilecon ankaŭ en la regiono kaj en Afriko ĝenerale.”

Preskaŭ ĉiuj politikaj partioj en Burundo salutis la atingitan paŝon, sed maltrankviliĝis pro la 33 postenoj promesitaj al la ribelintoj. Ili opinias, ke pro tio eblus denove malpaciĝi.

Jérémie SABIYUMVA



*Burundanoj bezonas pacon.*

# Testamento testata

**L**a atribuoj de la Nobel-pacpremio ĉiujare vekas tutmondan atenton. En la lastaj jaroj ĝin ricevis foje medi-aktivulo, foje defendanto de homaj rajtoj aŭ kampanjo kontraŭ amasmizero. Iuj miris, ke homoj, kiuj ne rekte okupiĝas pri paco, rajtas ricevi pacpremion. Sed la plimulto akceptas la pravigon, ke malriĉeco kaj detruo de la medio povas esti fundaj kaŭzoj de militoj.

Tamen aperis libro kun ampleksa analizo de la demando kaj detala prezento de la 108-jara historio de la premio kaj de la homoj, kiuj administris ĝin tra la jaroj. La verkinto estas Fredrik Heffermehl, juristo kaj i.a. vicestro de la Internacia Pacburoo.

La testamento de Nobel (1895) indikas rilate la interezojn, ke „unu parton ricevu tiu, kiu agis plej multe aŭ plej bone por interfratiĝo de la popoloj, abolo aŭ reduktado de starantaj armeoj kaj ankaŭ por starigo kaj multigo de packongresoj”.

## Tri kondiĉoj

Do ĝi specifikas tri kondiĉojn: popola interfratiĝo, malarmado kaj packongresoj. Ĉu oni komprenu, ke sufiĉas unu el ili por rajti ricevi la premion? Aŭ ke necesas ĉiuj tri? Heffermehl en sia libro (*Nobels vilje* (La volo de Nobel), eldonejo *Vidarforlaget*, Oslo, 2008) trovas, ke la tri kondiĉoj konsistigas unuecan vizion, kiu koincidas kun la celo de la pacmovado de la 1890aj jaroj. Tiam oni pledis por arbitracio inter konfliktantaj nacioj kaj okazis grandaj internaciaj packongresoj en Bern (1892) kaj Hago (1899).

Cetere Nobel nenie skribis pri „pacpremio”, sed li uzis aliloke en la testamento la vorton „pacpledantoj” aŭ

„pacfarantoj” (svede *fredsörfäktare*) kiel karakterizon de tiaj, kiaj ricevu tiun premion.

Kiom el la ricevintoj tra la jaroj estis veraj „pacfarantoj”? Heffermehl trovas, ke por 51 el la atribuitaj premioj la kondiĉoj de Nobel estas plenumitaj, por 37 ne (en 19 jaroj la premio ne estis atribuita, i.a. dum la du mondmilitoj).

## Larĝa senco

Kontraŭ la kritiko la Nobel-komitato asertis, ke jam ekde la komenco en 1901 ĝi interpretis la packoncepton de la testamento en larĝa senco. Tamen Heffermehl dokumentas, ke tio ne ĝustas. De la komenco ĝis la dua mondmilito la premio plej ofte estis atribuita al veraj pacfarantoj – idealistoj el la pacmovado. Sed post la milito, en la jaroj 1944-1997, nur duono konformas al la kondiĉoj de la testamento.

La komitatanoj de la postmilita tempo malfidelas al la vizio de Nobel pri malarmado kaj amikeco, akceptante la tradician pensmanieron: nacia sekurigo per arma forto. Kaj politikaj partioj ofte nomumas pensiiĝantajn parlamentanojn komitatanoj kiel honora rekompenco; Nobel tamen celis subteni senmonajn idealismajn pacfarantojn, ebligante al ili pluan porpagan agadon.

Fine, el la premioj atribuitaj en la lastaj dek jaroj eĉ nur kvarono akordas kun la kondiĉoj, nome Unuiĝintaj Nacioj / Kofi Annan (2001), Jimmy Carter (2002) kaj Mohamed El Baradei (2005). En tiu periodo la Nobel-instituto ŝajnas doni pli da atento al sia internacia renom kaj la bezono de sponsorado, ol flegi la originan ideon de Nobel, skribas Heffermehl.

Sed, ĉu la mondo ne ŝanĝiĝis post

la 1890aj jaroj? Ĉu ne necesas adapti la premion al la nunaj mondaj defioj? Kiel Nobel formulus sian testamenton hodiaŭ?

## Internaciaj rilatoj

Eblas ĝisdatigi la kondiĉojn, ne perdante la centran vizion. Inter pluraj ankoraŭ aktualaj celoj, kiujn listigas Heffermehl, estas malarmado, nun ankaŭ de atomarmiloj, stimulado de bonaj internaciaj rilatoj, frua malkovro de konfliktoj kaj ilia paca solvado, evoluigo de internacia aparato por deviga arbitracio, ankaŭ organizado de packongresoj (jes, tiaj ankoraŭ okazas) kaj ĝenerala kreado de packulturo.

La sekretario de la komitato volas pravigi la lastatempajn atribuojn, dirante, ke estas multaj vojoj al paco – mediprotektado, homaj rajtoj, kriza helpo al viktimoj de katastrofoj, sed ŝajnas forgesi, ke Nobel testamentis premion por specifaj vojoj antaŭ aliaj.

## Jura ordo

Post la apero de la libro la komitato atribuis premion por 2008 al Martti Ahtisaari pro lia paca mediaciado ĉe multaj internaciaj militetoj. Tiu agado absolute meritas premion, sed apenaŭ tiun de Nobel, taksas Heffermehl en intervjuo. Nobel celis malarmadon kaj starigon de internacia jura ordo, kio evitigu, ke konfliktoj alprenu militan formon.

Nepras, laŭ Heffermehl, sekvi la testamenton de Nobel pro morala kaj jura konsideroj. Tamen, li konkludas, bezonata estas premio, kiu fidelas al la celoj de Nobel, kiel stimulo al la hodiaŭaj pacfarantoj – tiaj, kiaj sen subvencio kaj agnosko strebadas kontraŭi la malicajn fortojn de blinda komerca pluarmado pli dange, ol iam ajn antaŭe.

Ĉu tiu kritiko stimulis publikan debaton en Norvegio? Ĝis nun ne: la Nobel-komitato konstatas nur, ke ĝi havas sian interpreton de la testamento kaj ne volas eniri ian ajn diskuton pri la afero.

Douglas DRAPER



# Punoj pro fuŝa lingvo



Kialo de la leĝpropono estas „malaltiĝo de la lingva kulturo”.



Pro publike faritaj eraroj kaj pro superflua uzado de fremdaj vortoj en la slovak lingvo minacas sankcioj ekde la 1a de julio 2009.

La punojn proponas en nova leĝpropono pri la ŝtata lingvo la Ministrejo pri Kulturo en Slovakio. La nuntempa leĝo ne ebligas sankciojn pro malrespekto de la oficiala lingvo. Tiujn oni ellasis el la leĝaro en 1999, kio „malfermis pordon al senbrida kresko de malrespektado de la leĝo pri la ŝtata lingvo”.

En la argumenta raporto por la leĝpropono oni skribas, ke respektadon de la leĝo pri la ŝtata lingvo kontrolas la ministrejo pri kulturo, kiu sankcios

(publike faritajn) erarojn per monpunoj de 100 ĝis 5000 eŭroj. Esceptoj estos radio kaj televido, kiujn kontrolas la ŝtata Konsilantaro pri Emisado kaj Transmisio.

Kialo de la leĝpropono estas „malaltiĝo de la lingva kulturo”. Tiu, laŭ la ministerio, manifestiĝas – krom en pekado kontraŭ gramatikaj kaj ortografiaj reguloj en la slovak lingvo – ankaŭ per troa uzado de fremdaj vortoj. Kulpas precipe anglismoj kaj usonismoj kaj ilia superflua uzado ankaŭ tie, kie por la vortumo ekzistas konvena hejmlingva esprimo.

Stano MARČEK



Ekzemploj de troa uzado de fremdaj vortoj.



JAPANIO

# Malsana sistemo

**K**redis japanoj, ke pro alta nivelo de japana medicino la popolo estas perfekte protektata kontraŭ malsanoj. Kredo tia, tamen, ŝanceliĝas. Tra Japanio, ne nur en provincaj urboj kaj vilaĝoj, sed ankaŭ en grandaj urboj kiel Tokio, okazas bankrotoj kaj fermo de hospitaloj. Aperas novaĵoj pri mortoj pro manko de sufiĉa kuracado.

Fermiĝis ekzemple la hospitalo de la urbo Ĉooŝi kun 72 000 loĝantoj en la gubernio Ĉiba. Ĝi estis polikliniko kun 16 fakoj kaj 393 litoj. La urbestro abrupte fermis la hospitalon, ĉar la urba financo estas tiel malbona, ke ĝi ne plu povas subteni ĝin. Kolektiĝis 50 000 subskri-

boj kontraŭ la fermo, sed vane: tiamaniere 166 enhospitaligitoj kaj vizitantaj pacientoj estas forĵetitaj de la urbo (kaj de la ŝtato) kiel medicinaj rifuĝintoj.

## Bebo

En Tokio 36-jara gravedulino suferis pro vomado, lakso kaj severa kapdoloro. Oni petis, ke la Tokio-municipa hospitalo Bokutoo ŝin akceptu, sed tiu rifuzis pro manko de kuracistoj. Oni petis ĉe sep aliaj hospitaloj, sed ĉiuj rifuzis. Fine la unua hospitalo Bokutoo decidis akcepti ŝin kaj sukcesis naskigi la bebon. La patrino tamen mortis pro sangado en la cerbo. Poste evidentiĝis, ke al 11 municipaj hospitaloj en Tokio mankas 56 kuracistoj, el kiuj 12 estas akuŝologoj.

En la 1970aj jaroj la registaro havis projekton „Unu gubernio, unu medicina universitato”, kaj la nombro de kuracistoj grandiĝis. En 1982 la registaro decidis subpremi la nombron de studentoj en medicinaj fakultatoj. En 1997 ĝi aprobis daŭrigon de tiu ĉi politiko. La rezulto estas la nuna situacio.

## Statistiko

Tial, laŭ statistiko de la Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE), Japanio okupas la 26an lokon inter ĝiaj 30 membroŝtatoj koncerne la nombron de kuracistoj por 1000 loĝantoj. En 2008 la registaro decidis grandigi la nombron de studentoj en medicinaj fakultatoj, de 4000 al 4300, sed tio estas „akvoguto sur brula ŝtono”, kio efikos nur post 10 jaroj.

Kontribuas al la krizo la maniero trejni kuracistojn. Ĉiu volas finstudi ĉe bone ekipitaj hospitaloj, kaj do ne ĉe provincaj universitataj hospitaloj. Al ili do mankas kuracistoj, kaj tial ili revenigas medicinistojn el lokaj hospitaloj. Tiam al tiuj siavice mankas fakuloj kun la rezulto, ke fermiĝas lokaj hospitaloj, kaj suferas la popolo.

Dum la pasintaj 10 jaroj naskiĝis en Japanio granda malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj. Simile naskiĝas malegaleco pri kuracado.

HORI JASUO

JAPANIO

# Premioj – kaj premoj

**P**leniĝis pasintjare japanaj ĵurnaloj per novaĵoj pri kvar Nobel-premiitoj: pri fiziko Nanbu Jooičiroo (87-jara), Kobajaŝi Makoto (68-jara) kaj Masukaŭa Toŝihide (68-jara); kaj pri kemio Ŝimomura Osamu (80-jara). Ĝis nun neniam venis samtempe kvar premiitoj el Japanio. Tamen malantaŭ la novaĵoj kuŝas premoj por japana scienco.

Grava problemo konsistas en tio, ke esploristoj elmigras el Japanio. En la lando mankas bona kondiĉaro por studi kaj tial multaj esploristoj elmigras al Usono, kaj neniam revenas. El la kvar premiitoj, du nun loĝas en Usono kaj unu el ili akiris usonan ŝtatanecon (do, li jam ne estas japano).

Cetere velkas intereso en Japanio pri

scienco. En 2003 japanaj lernantoj akiris bonan rezulton en internacia ekzameno pri scienco, sed al la demando „Ĉu lernado de scienco donas al vi ĝojon?” nur 19 % de la 13-jaraj lernantoj respondis jese – 25 % malpli ol la internacia mezumo de 44 %. Krome al multaj lernantoj mankas sperto pri naturo. Komputado, televido kaj legado en la ĉambro ne malfermas la naturan mondon al lernantoj kaj sekve ne kondukas tiujn al scienco.

## Multjaraj esploroj

Kulpas ankaŭ la japana registaro, kiu postulas nur tujajn rezultojn. La ministerio pri edukado kaj scienco distribuas monon al universitatoj laŭ klare videblaj

rezultoj, kaj sekve tiuj postulas similajn de profesoroj. En tia situacio, multjaraj esploroj ne estas bonvenaj. Masukaŭa Toŝihide, unu el la kvar premiitoj, kritikas la nunan politikon: „Kiam fonto (baza esploro) mortas, la rivero mortas. Por scienco necesas 50 jaroj, 100 jaroj. Oni ne atendu tujan rezulton.”

Eble pro la supraj kialoj malmultiĝas la nombro de japanaj studaĵoj pri scienco. En 2007 aperis 90 185 japanaj studaĵoj, tiel ke Japanio okupas la kvinan lokon en la mondo. En 2006, tamen, ĝi okupis la duan lokon. Dum la pasintaj 10 jaroj kreskis la nombro de studaĵoj je nur 2 %.

La kvin pintaj landoj laŭ la nombroj de studaĵoj (kaj, inter krampoj, la kresko) jenas: 1. Usono 344 375 (10 %); 2. Ĉinio 180 970 (50 %); 3. Britio 109 342 (35 %); 4. Germanio 93 033 (25 %); 5. Japanio 90 185 (5 %). En ambaŭ kampoj (nombro de studaĵoj kaj kresko) perdas Japanio sian antaŭan gloron.

HORI JASUO



# Retturmentado subtaksita

**U**nu kvarono de la belgaj junuloj en la pasinta lerneja jaro spertis retturmentadon, ĉu kiel turmentanto, ĉu kiel viktimo, ĉu kiel atestanto. Tiujn ciferojn ĵus publikigis la *Vrije Universiteit Brussel* (Libera universitato de Bruselo).

Multaj junuloj bagateligas la fenomenon, sed kaj la viktimoj kaj la kulpuloj pli kaj pli ofte montras signojn de emociaj kaj konduk-problemoj. „Retturmentado estas relative nova fenomeno,” diras la bruselaj esploristoj. „Ni parolas pri retturmentado, se iu persono estas regule kaj dum difinita periodo turmentata pere de retpoŝto, blogaĵoj kaj aliaj elektronikaj rimedoj. Same kiel dum ‘tradicia’ turmentado, reta turmentado havas ne nur vortajn formojn, sed ankaŭ fizikajn. Oni ekzemple sendas viruson

al la kompatindulo aŭ provas kaperi ties komputilon.”

## Kulpuloj

La psikologia forto de retturmentado tamen ŝajnas esti multe pli drasta ol tiu de la klasika turmentado. La fakto, ke la kulpulo povas teni sian identecon kaŝita, donas al li eĉ pli da forto, kaj ke la ĉikanado povas okazi 24 horojn el 24 estas tre nervostreĉa.

Opinias la esploristoj: „La junuloj devus kompreni, ke sendi malagrablajn leterojn komputile aŭ per poŝtelefono, aŭ komenti malagrabla pri iu en sia blogo, estas formo de turmentado. Tre ofte la kulpuloj ne konscias pri la graveco de sia agado.”

Ankaŭ ene de la Esperanto-movado kazoj de retturmentado estas konataj.



*La fakto, ke la kulpulo povas teni sian identecon kaŝita, donas al li eĉ pli da forto, kaj ke la ĉikanado povas okazi 24 horojn el 24 estas tre nervostreĉa.*

Ĉar tie tre ofte temas pri interŝtata formo de turmentado, reagi estas eĉ pli malfacile ol inter lernejoj samurbaj.

Paŭl PEERAERTS

## ALBANIO

# Dato-debato

**O**ficiale la tago de la liberiĝo de Albanio estas la 29a de novembro 1944. Tion difinis unue la eksa komunisma reĝimo. Krome la tago de sendependiĝo estas la 28a de novembro 1912. Sed post 1991 oni festas la tagon de liberiĝo dudate: dekstruloj la 28an de novembro kaj maldekstruloj la 29an de novembro.

Laŭ dekstruloj, la lando estas fakte liberigita la 28an de novembro, kio koincidas al la tago de sendependiĝo. Tiun tagon, en 1443, la nacia heroo Skander-

beg starigis sur la Kruja kastelo la albanan standardon, tiel proklamante ribelon kontraŭ otomanoj. Tiel oni festus unutage tri gravajn historiajn eventojn.

## Civila milito

Pro tio, en 1992, parlamento de dekstruloj ŝanĝis la daton de liberiĝo, sed kvin jarojn poste venkintaj socialistoj restarigis la antaŭan tagon de liberiĝo. Eksaj komunistoj, nostalgiantes pro „glora” kontraŭfaŝista milito (kiu estis siavice pleje civila milito), volus klare

distingi la du datojn, por reliefigi la naci-liberigan eventon kontraŭ la sendependigaj militoj.

Cetere la 29a de novembro estis ankaŭ la nacia festo de eksa Jugoslavio, granda aliancano de komunistoj albanaj. Siatempe Josip Broz Tito (la ĉefo de la jugoslavaj komunistoj) sendis telegramon al Enver Hoxha (la ĉefo de la albanaj komunistoj), per kio li postulis, ke la nacia festo de Albanio koincidu kun tiu de Jugoslavio. Ne hazarde ĉi-jare oni apenaŭ celebris la feston de sendependiĝo en ĉefurbo estrata de la socialisto Edi Rama. La tagon de liberiĝo, tamen, oni aranĝis kiel kutime parade kaj pompe.

Bardhyl SELIMI



# Novjaraj pensoj

**L**a novan jaron 2009 mi festis monde. Mi sidis kun la edzino en nia loĝejo antaŭ la televido. Kabla televido proponas 70 programojn, kaj ni serĉis ion interesan por spekti. De tempo al tempo mi rigardis mesaĝojn en komputilo. Sur tablo estis skota viskio, vino el Montenegro, porkidaĵo el Serbio, kaj por la novjaro mem pretis ĉampano el Francio.

Mia filo kaj bofilino telefonis el Azerbajĝano, mia filino el Berlino, mia bofratino kaj ŝia filo sendis mesaĝon el Sirakuzo, al mi telefonis onklino el Londono kaj ŝia filino el Honkongo. Bondezirojn sendis al mi esperantistoj: Dorota el Pollando, Imre el Hungario, Karesema kaj Vitor el Brazilo kaj Aleksandro el Rusio. Mi ne volas nombri amikojn el nia urbo, parencojn el Montenegro.

## Tutmondiĝo aŭ neceso

Eblas diri, ke mi apartenas al riĉa familio el la Eŭropa Unio. Tamen fakte ne estas tiel. Ni vivas en Serbio. Nur formale, oficiale, sed ne reale. Kiel? Vero estas, ke ĉiuj finstudis, parolas aliajn lingvojn, sed ni loĝas, vivas kaj laboras en diversaj lokoj de la mondo. Ĉu tutmondiĝo aŭ neceso?

El Serbio dum la lastaj 20 jaroj formigris ĉirkaŭ duonmiliono da homoj. Ĝenerale gejunuloj. Ĉirkaŭ 100 000 estas altlernejoj de diversaj fakoj. Post longa periodo komenciĝis interparoloj pri la eblo reveni. En Serbio tamen ĉio estas normala. Ĝi estas denove ŝtato en Eŭropo, sed ne en Eŭropa Unio. Tamen, 20 000 homoj alvenis al Beogrado por tie atendi la novan jaron. Pli ol duono estas civitanoj de Eŭropa Unio.

## Virtuala ekonomio

Ĉiuj evitas paroli pri la monda ekonomia krizo. Kvazaŭ ĝi ne alvenus en Serbion. Tutmonda eksplodo de hipo-

kriteco kaj mensogo, kaŭzita de la detruo de virtuala monda ekonomio, certe ne povas preterpasi Serbion. Ĉi tiu jaro estas proklamita la jaro de astronomio. Ĝi estas ankaŭ la jaro de la serba sciencisto Milutin Milanković okaze de la 130a datreveno de lia naskiĝo. Li estis la unua doktoro de teknikaj sciencoj ĉe serboj, kaj la usona kosm-esplora agentejo NASA lokas lin inter la dek plej gravaj sciencistoj en la mondo.

Montenegro rekonis la sendependecon de Kosovo unu tagon post kiam Serbio en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj cedis ĉi tiun „varmegan terpomon” al la Internacia Kortumo, por ke tiu pritaksu la leĝecon de sendependeco. Serbio subskribis kun la Eŭropa Unio konvencion pri aliĝo al la unio. Sed aliĝo estas ankoraŭ malproksima, precipe ĉar la polico ankoraŭ serĉas militkrimulojn Mladić kaj Hadžić por liveri ilin al la Haga Tribunalo, kiu denove kolerigis serbojn pro la liberigo de Orić kaj Haradinaj.

## Malfirma registaro

Subskribitaj estas kontraktoj por vendi la nafto-industrion de Serbio al rusoj, por konstrui gaskonduklon tra Serbio kaj gas-staplejon. La kontraktoj havas multajn subtenantojn, multajn kontraŭulojn. Antaŭ nelonge la politikaj kontraŭuloj, la Demokrata Partio kaj la Socialista Partio, fondis malfirman registaron, kiu akceptis limigitan buĝeton. La opozicio prognozis mallongan daŭron de la registaro, sed ĝi ankoraŭ ne disiĝis. Intertempe deputitoj perdas tempon kaj konfidon de balotantoj pro kvereloj en la parlamento.

Venkoj de serbaj tenisistoj kaj ilia loko en la monda sporto altigas la reputacion de Serbio. Cetere la serba televido ricevis laŭdon pro la organizado kaj dissendo de la t.n. Eŭrovido-kantokonkurso. Tiel oni eniris la novan jaron 2009. Kion atendi de la tutmonda krizo kaj de la enoficigo de nova usona prezidanto, montros la estonteco.

Dimitrije JANIĆIĆ



# Pendole pedale

**E**n Burundo la biciklo iĝas kutima kaj plej ŝatata transportilo de granda parto de la loĝantaro. La klarigo estas simpla. La lando trairis militon dum 13 jaroj, kio ĉion fuŝas. La ekonomio ŝrumpis kaj la lando ne povas kovri sian buĝeton (ĉirkaŭ 53 % de la ŝtata buĝeto venas de ekstero). Evoluintaj landoj helpas per mondonacoj, sed la popolo de Burundo ne profitas, ĉar eta grupo enpoŝigas ĉion.

Prezroj triobligis, sed salajroj ne ŝanĝiĝis. Nur la salajroj de deputitoj, ministroj kaj ĝeneralaj direktoroj altiĝis kaj tio kaŭzas senĉesajn strikojn. Inter la prezroj, kiuj kreskis, estas tiuj de lupagoj, manĝaĵo kaj transporto. Multaj laboristoj ne povis pagi transport-kostojn el siaj loĝkvartaloj al la ĉefurbo Bujumburo. Pro la nekapablo kunigi la du ekstremaĵojn de la monatoj, ili ekpensis pri bicikloj.

## Popularaj

Tial naskiĝis du transportomanieroj: motorciklo kaj biciklo. Motorciklo tamen estas tro kosta, kaj pro tio ekaperis taksi-bicikloj, kiuj intertempe fariĝis tre popularaj. Tiamaniere eblas pendoli inter loĝ- kaj labor-loko en la ĉefurbo kontraŭ ekvivalento de nur 0,13 eŭroj.

Sed, malpli pozitive, la nombro de strat-akcidentoj kreskis, ĉar multaj taksi-biciklistoj ne konas la trafikajn kodon. Rezulte la registaro decidis malpermesi biciklan trafikon en la ĉefurbo. En 2005 okazis manifestacioj por protesti kontraŭ tiu ĉi regulo, ĉar jam estis malfrue por subite haltigi biciklo-trafikon. La registaro



*Furoras biciklo-taksio en Burundo.*



*Multaj familioj vivtenas sin per biciklo-taksiado.*

ŝanĝis sian decidon, sed estas konsentite, ke biciklistoj ne eniros la parton de la ĉefurbo, kie trafiko estas granda.

Multaj familioj vivtenas sin per biciklo-taksiado, kaj multaj aliaj profitas de tiu ĉi malmultekosta servo trovebla en ĉiuj urboj en Burundo. Intertempe kreskas uzo de ĉiuj transportiloj, inkluzive busoj, kies ŝoforoj foje mortigas biciklistojn, pretekstante, ke tiuj forprenas pasaĝerojn, kiujn ili povus ricevi.

Jérémie SABIYUMVA

## KULTURO

# Kanonoj, kanzonoj

**M**uziko kaj milito: jen la temo de koncerto okazinta en junio en la albana ĉefurbo Tirano, kiam la kanto-aŭtoro kaj eksa soldato James Blunt [ĝejmz blant] ravigis spektantojn. Blunt, brito, deĵoris antaŭ kelkaj jaroj en Kosovo kiel komandanto de la tieaj britaj pacgardistoj. Militista kariero tamen ne malhelpis ankaŭ artan. Spektantoj, kiuj plenplenigis la centran stadionon en Tirano, ĝuis ne nur belajn kanzonojn kiel „Mi amas vin, belulino”, sed ankaŭ vidaĵojn el la milito en Kosovo elektitajn de la artisto mem.

Bardhyl SELIMI



INFANOJ

# De mielo al malfeliĉo



EL CLUNTO

*Multaj ne havas gepatrojn, sed jes ja gefratojn, kiujn ili devas prizorgi.*



JÉRÉMIE SABIYUMVA



JÉRÉMIE SABIYUMVA



JÉRÉMIE SABIYUMVA

**L**a milito en Burundo inter 1993 kaj 2005 kaŭzis financajn, homajn kaj materialajn damaĝojn. Burundo, antaŭe nomita lando de lakto kaj mielo, iĝis lando de sufero kaj malfeliĉo. Aparte suferas infanoj.

Ĉie en la ĉefaj urboj vidiĝas infanoj, kiuj almozpetas por akiri ion por manĝi, dum aliaj laboras kontraŭ manĝaĵo, kaj kelkaj ŝtelas. Oni distingas multajn kategoriojn de infanoj. Kelkaj havas gepatrojn, kiuj ne kapablas nutri siajn idojn aŭ pagi lernokotizon, kaj do ili sendas la infanojn por almozpeti en la urbojn, por ke tiuj resendu monon al la gepatroj.

Aliaj ne havas gepatrojn, sed jes ja gefratojn, kiujn ili devas prizorgi. La ŝtato provis arigi tiujn infanojn por helpi ilin, sed la politiko fiaskis. Cetere la infanoj ne estis antaŭe konsultataj por pridiskuti la registarajn planojn. Multaj vivas do mizere kaj ofte ne atingas sian 26an vivojaron.

Jérémie SABIYUMVA



# Albanaj edzinoj por serbaj fraŭloj

**L**a vilaĝo Bogalinac en Serbio konsistas el 163 loĝantoj. Tie vivis antaŭ 17 jaroj 255 homoj kaj en 1948 700. Malkreskas la loĝantaro de la vilaĝo kiel en tuta Serbio, kaj samtempe kreskas la meza aĝo de la popolo.

Pro tio serbaj fraŭloj nun serĉas albanajn novedzinojn. Tion faris ekzemple Ĵikica Radojkoviĉ, kiu edziĝis al albana knabino Gentiana. Li konatiĝis kun ŝi en Shkoder [ŝkoder] en norda Albanio, kien li iris laŭ propono de amikoj. Gentiana enamiĝis al sia edzo ekde la unua tago, eklernis la serban kaj konvertiĝis al la ortodoksa eklezio. Ŝi nun zorgas pri la hejma mastrumado kaj paŝtado de la ŝafaro.



## Moroj

Ne ĉiuj loĝantoj de Bogalinac konsentas pri tiaj geedziĝoj. Ili timas, ke tiamaniere albanoj asimilos la serban popolon. Ili eĉ diras, ke en Serbio estas fondata „Nova Kosovo”. Aliaj vilaĝanoj tamen bonvenigas la albanajn edzinojn, dirante, ke tiuj bone adaptiĝas al vilaĝo, moroj kaj vivmaniero serbaj. Ene de duonjaro la edzinoj bone parolas la serban kaj vizitadas regule la preĝejon.

Miksaj geedziĝoj inter albanoj kaj serboj estas jam malnovaj. En 2007 en la vilaĝo Buĝevo kolektiĝis 40 tiaj paroj. La edzoj raportis feliĉe pri siaj spertaĵoj, dirante, ke serbaj virinoj ofte revas pri vivo en grandaj urboj kaj ne volas naski bebojn de tiel nomataj montaranoj.

**Bardhyl SELIMI**

## KRIMADO

# Pilorio senpolica

**B**utikisto el Karlareĝo (Charleroi) en la sudo de Belgio fiksas ŝtelinton al lanterna fosto en la plej vizitata placo de la urbo. La ŝtelinto dum pli ol duona horo duonnude lamentadis, kun ŝildo surbruste: „Mi estas ŝtelinto”. La drogdependa krimulo estis forpreninta komputilon de butikisto, kiu jam plurfoje spertis ŝtelon.

Diris al la gazetaro la vendisto: „Li estis la deka ŝtelanto en mallonga tempo, kaj la polico nenion faras. Por mi nun

sufiĉis; mi kaptis la ŝtelinton kaj fiksas lin per multaj plastaj ligiloj al meritita pilorio.”

La ŝtelinto estis liberigita post iom da tempo de preterpasantoj, kaj probable do denove eskapos senpune. La butikisto tamen riskas punojn pro kaperado, limigo de libereco kaj torturado. „Dura lex, sed lex”, diris jam la romianoj: la leĝo estas dura, sed ĝi restas la leĝo ...

**PAÛL PEERAERTS**

## BELECKONKURSO

# Fraŭlino Paco



*Venkis Alida Kaneza, kiu reprezentos sian landon dum diversaj kulturaj kaj sportaj eventoj kaj partoprenos ankaŭ internaciajn beleckonkursojn.*

**U**nuafoje en Burundo okazis beleckonkurso. Laŭ la organizintoj ĝi celas montri al eksterlandanoj, ke ankaŭ en Burundo regas paco. Ĉeestis la eventon en Buĵumburo ministroj, ambasadoroj kaj la reprezentanto en Burundo de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

Enskribiĝis al la konkurso 82 fraŭlinoj, el kiuj 20 partoprenis la finalon. La fraŭlinoj devis montri inter aliaj lingvaj kapablojn (pri la burunda, franca kaj angla lingvoj) kaj posedi minimuman mezgradan instru-diplomon.

Venkis Alida Kaneza, kiu reprezentos sian landon dum diversaj kulturaj kaj sportaj eventoj kaj partoprenos ankaŭ internaciajn beleckonkursojn.

**Jérémie SABIYUMVA**

ĈEHIO

# Nova Esperanto-muzeo



*La Ottendorfer-biblioteko en Svitavy.*

**E**n la urbo Svitavy (okcidenta Moravio) oni solene malfermis novan Esperanto-muzeon. En ĝi oni lokis la bibliotekon de Jaroslav Šustr (5800 volumoj) kaj aliajn valorajn ekspoziciaĵojn. Ili troviĝis ĝis nun en la urba muzeo en Česká Třebová.

Al la nova muzeo oni disponigis salonon en unu el la plej belaj historiaj konstruaĵoj en Svitavy, la Ottendorfer-biblioteko, portanta la nomon de mecenato, kiu ĝin konstruigis en 1892. Siatempe ĝi posedis la plej ampleksan kolekton de germanlingvaj libroj (22 000 volumoj) en Moravio.

La muzeo konsistas el du partoj. La unua, pli granda, servas kiel ekspoziciejo. En ĝi estas 13 surmuraj informpaneloj, 5 tablovitrinoj kaj vico de vitroŝrankoj. La unua ekspozicio strebas doni al vizitantoj bazajn konojn pri Esperanto kiel lingvo kaj movado. De la planlingvaj projektoj antaŭ Zamenhof

ĝis la nuntempa Esperanto-aktivo. Meze de la muzeo estas lokita granda busto de L. L. Zamenhof, kiu devenas plej probable de la jaro 1921 (de la 13a UK en Prago). Kiel pliajn unikaĵojn ni menciui almenaŭ la tutan jarkolekton 1912 de la japana kolora mane bindita „Ĉiumonata internacia gazeto ORIENTA AZIO” kaj originalon de la unua lernolibro de Esperanto en la ĉeĥa lingvo fare de F. V. Lorenz (1890).

La muzeo strebas tuj dekomence esti multe pli ol nura ekspoziciejo de esperantaĵoj. Ĝi devus servi kiel esplorejo. Tial nun tie estas multifunkcia informpanelo kun tuŝekrano, kie oni povas ekkoni la bazajn informojn de Esperanto, ĝian gramatikon, sed ankaŭ kulturon kaj realaĵojn, ĝui la lingvon eĉ aŭde, aŭskultante deklamatan tekston kaj kantadon. Krome tie estas studloko provizita per komputilo, kiu enhavas multajn utilajn informojn, ekzemple grandan elektronikan ĉeĥan-esperan-

tan kaj esperantan-ĉeĥan vortarojn kaj liston de Esperanto-libroj disponeblaj. Plia agrabla afero por la esplorantoj kaj studentoj estas, ke en la konstruaĵo mem eblas favorpreze tranokti, ĉar subtegmente troviĝas tri gastĉambroj, apartenantaj al la urba muzeo.

La ĉefa konstruaĵo de la urba muzeo kaj galerio situas en najbareco de la Esperanto-muzeo kaj enhavas du daŭrajn ekspoziciojn: pri la plej konata naskito el Svitavy kaj savinto de centoj da judoj Oskar Schindler kaj pri tolaĵlavado kaj lavaĵmaŝinoj. Aldone al ili la Esperanto-muzeo prezentas la trian daŭran ekspozicion en Svitavy.

Baldaŭ estos organizita ekspozicio pri du paralelaj temoj: „Kvardek jaroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio” kaj „Esperanto kaj junularo”. Tiu devus daŭri ĝis la ĈEA-konferenco, kiu okazos en Svitavy de la 9a ĝis la 11a de oktobro 2009.

---

Se vi pretas helpi per ajna mesaĝo (gratulo, interesiĝo k.a.), bonvolu uzi prefere ambaŭ retadresojn: [muzeo@esperanto.cz](mailto:muzeo@esperanto.cz) kaj [esperanto@muzem.svitavy.cz](mailto:esperanto@muzem.svitavy.cz). La korespondada adreso estas: Esperanto-muzeo, Máchova alej 1, CZ-568 02 Svitavy, kaj la TTT-ejo: [muzem.esperanto.cz](http://muzem.esperanto.cz)

Petro CHRDLE



*La salono de la Esperanto-muzeo.*

# Ĉu vera katoliko?



33 % de la litovaj kredantoj preĝejon vizitas nur dum religiaj festoj

**L**aŭ oficiala statistiko 79 % de la litovoj estas romkatolikoj. Malgraŭ tio, ke katoliko estas konsiderata tiu, kiu estas oficiale baptita, pli granda parto de litovaj katolikoj ne estas veraj – ili malofte vizitadas preĝejon, ilia ĉiutaga vivo estas iom for de katolikaj doktrino kaj reguloj. Pri sia katolikeco ili rememoras nur ĉe geedziĝo aŭ funebra ceremonio.

Ideala katoliko estas tiu, kiu festas la „Sinjoran tagon”, dimanĉon. Ĝenerale la litovoj amasvizitas siajn preĝejojn nur dum la tago de la mortintoj, Kristnasko kaj Pasko. La litova eklezio tiurilate havas modestan postulon: necesas almenaŭ unufoje dum la jaro, Paske, fari konfesion kaj akcepti komunian sakramenton.

Litovaj sociologoj rimarkigas, ke dum multaj jaroj 79 % de la litovoj identigas sin kiel katolikoj. Tio ne signifas, ke ĉiuj estas praktikantaj katolikoj. Pri sia katolikeco la popolo senkaŝe deklaris nur de post la ŝtata sendependiĝo en la jaro 1990. Samtempe aldonindas, ke la litovaj katolikoj estas dispartigindaj en du kampoj: ne veraj kaj veraj, kies ĉiutaga vivo strikte baziĝas sur katolikaj valoroj. Al la lastaj apartenas ĉirkaŭ kvinono de la litova socio.

Krome, spertuloj parolas pri siaspeca socia premo – devigo esti katoliko. Ekzemple, estas normo geedziĝi en la preĝejo, malgraŭ ke Litovio estas unu el la progresintaj EU-landoj laŭ statistiko de divorcoj. Dum la unuaj jaroj post la resendependiĝo rimarkiĝis pli granda kvanto de tiuj, kiuj neis ajnan konfesion, malgraŭ ke nun la plej granda parto deklaras sin katolikoj. Dum la sovetia periodo la kredantoj estis en malfavora situacio. Post la resendependiĝo, kontraŭe: ne estas bonmore esti laiko, kio estas konsiderata kiel postrestaĵo, relikvo de la sovetiaj tempoj.

Tamen la litova eklezio ne maltrankviliĝas pri la religiemo de siaj samlandanoj. Se oni komparas ĝin kun la situacio en aliaj landoj de Eŭropo, kie preĝejon vizitadas nur 4-5 % de la katolikoj, Litovio aspektas tute normale. La kvanto de edziĝoj en la preĝejo daŭre kreskas. Pli bedaŭrinde estas, ke pri sia katolikeco multaj litovoj memoras nur, kiam ili intencas geedziĝi aŭ devas entombigi proksimumojn.

En pasintjara sociologia enketo evidentiĝis, ke 80,2 % de la respondintoj atribuas sin al romkatolikoj, 2,7 % al la ortodoksa kristanismo, 0,7 % al malnovritanoj, 0,6 % al evangeliaj luteranoj, 0,4 % al reformitoj. Ĉiu deka indikis pri nenia aparteno al religio. 33 % de la respondintoj indikis, ke preĝejon ili vizitas nur dum religiaj festoj, Kristnasko kaj Pasko, 17 % tion faras nur unufoje en la jaro aŭ eĉ pli malofte, 16 % almenaŭ unufoje en monato, 9 % kelkfoje dum monato, 8 % almenaŭ unufoje en semajno. 13 % ne vizitas preĝejon kaj ne partoprenas religiajn ceremoniojn. Malgraŭ ĉio 78,6 % sin kvalifikas kiel kredantojn kaj 16,4 % kiel indiferentajn al religio.

LAST

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO DE ESPERANTO

## Rezultoj de la MONATO-konkurso

Okaze de la 30-jariĝo de MONATO okazis konkurso inter la partoprenantoj de la UK en Roterdamo, de la IF en Düsseldorf kaj de la NR en Frankfurt. Jen la listo de gajnintoj:

- Gajnis 3-jaran abonon al la papera versio de MONATO: Pierre Houenavo, ĉe ONG Esperanto Afrik', Benino.
- Gajnis 1-jaran abonon al la papera versio de MONATO: Jón Eliasson el Islando, Navas López el Salvadoro kaj Boriana Stefanova el Bulgario.
- Gajnis 1-jaran abonon al la reta versio de MONATO: Ann-Louise Åkerlund (Svedio), Karine Arakelyan (Armenio), Anna Bennett (Usono), Snorre Benum (Norvegio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Fidanka Bocheva (Bulgario), Sanja Bokulić (Kroatio), Laurent Burgbacher (Svislando), Alejandro Cossavella (Argentino), Cyrille Découture (Francio), Adair de Arêda Vasconcelos (Brazilo), Christoph Frank (Germanio), Philippe Gallais (Francio), Paul Gorny (Aŭstralio), Geoffrey Greatrex (Kanado), Huĝimoto Tacuo (Japanio), Claudio Imbrenda (Italio), Didier Janot (Francio), Jurij Karcev (Rusio), Mira Esmee Kenning (Nederlando), Eŭheno Kovtonjuk (Ukrainio), Waldemar Lipowicz (Pollando), Radmilla Lotter (Germanio), Monika Molnar (Svislando), Kamiński Robert (Pollando), Gabrielle Tréanton (Francio) Juan José Vera Martín (Hispanio), José Antonio Vergara (Ĉilio), Peter Warren (Anglio) kaj Andreo Weir (Skotlando).

MONATO deziras al ĉiuj gajnintoj multe da legoplezuro!



# Spirituala materialismo

**Kiel la subskribo „la redakcio” montras, teozofoj proponas sian laboron sen atentigo pri aŭtoro: ne gravas personoj, gravas la temo. La jena teksto estas ĉefartikolo el *Theosofie*, trimonata gazeto pri teozofio. La tri teozofiaj celoj (de la Unuiĝinta Loĝio de Teozofoj) estas: la formado de kerno de Universala Homa Frateco, sen distingo de raso, kredo, sekso, personaj cirkonstancoj aŭ direkto; la kompara studo de malnovaj kaj modernaj religioj, filozofioj kaj sciencoj kaj la monro de la graveco de tia studo; la esploro de la nekonataj naturleĝoj kaj la psikaj kapabloj en la homo.**

**G**ravaj elementoj de la teozofia doktrino estas la sepobla konsisto de la homo, la reenkarniĝo, la ideo de karmo kaj la ciklo de la kosmo, la vivo kaj la homara evoluo.

*La fido estas oazo en la koro,  
kiun neniam atingos la karavano  
de la pensoj.*

*Kahlil Gibran*

Pli ol iam antaŭe estas en nia socio granda malsato je spiriteco, je instruoj kaj instrukcioj, kiuj faros nin fine feliĉaj. Sed ĉu ni vere scias, kion spiriteco implicas? Ekzistas tiom da kursoj kaj lernejoj, tiom da „spiritaĵ” ideoj kaj teknikoj, ke preskaŭ estas io absurda kaj ankaŭ io profunde bedaŭrinda en la konfuzo de ĉi tiu „nova epoko”. La fakto, ke la vorto „spiriteco” estas volonte uzata en ĵurnaloj kaj popularaj televidprogramoj, kvazaŭ ĉiuj komprenus kio ĝi estas, jam estas indiko ke nia kulturo estas spirite fremdiĝinta. Kiam io iĝas populara, kiel okazas nun kun spiriteco kaj esoterajoj, ĝi devas ja perdi sian esencan signifon, ĉar spiritaĵaj principoj ja estas netaŭgaj por amaskomunikado. Kiam difinitaj ideoj estas prezentataj kiel spiritaĵaj instruoj, tio ankoraŭ ne signifas

ke ili ankaŭ estas spiritaĵaj. Kaj inverse: kiam vera spiriteco estas proponata, ne sekvas aŭtomate ke ankaŭ ĉiu aprezas kaj akceptas tiun proponataĵon. Oni ja estu kapabla rekoni la spiritan kiam ĝi prezentas sin kiel tian. La realo tamen estas, ke homoj interesataj pri spiriteco ne ĉiam scias, kiel distingi tion kio estas vera de tio kio estas falsa. Tiel, unu el la plej grandaj miskomprenoj estas, ke ni povus sen tro multa peno atingi spiritan progreson. Artikolo pri *Meditado kaj Memstudo* rimarkigas pri tio jenon:

„Ĉu la historion ni ne konas sufiĉe longe por esti skeptikaj kontraŭ lernejoj kiuj tro multe kaj tro rapide promesas dum ni scias, ke tio en neniuj kampoj de nia vivo funkcias? Ĉu ni irus aŭskulti muzikiston kiu laŭte anoncas ke en unu semajno li ludigos nin violonĉelon same bone kiel Casals [Kazals]? Ĉu ni prenus lin serioze? Kial ni do lasus nin misgvidi sur la plej sanktaj terenoj? Ĉu pro nia malpacieneco, nia sento de senvaloro, ia ektimo pri fiasko? Tiuj demandoj reĵetas nin al ni mem. Tiel longe kiel homoj deziras ion kontraŭ nenio, monon sen labori, scion sen studado, povon sen kompetento, virton sen iu ajn formo de asketismo, miloj da pseŭd-inicaj centroj



COBALTI23

ekfloros, kiuj la veran sekretan lingvon de la ‘teknikistoj de l’o sankta’ imitos.”

Vera spiriteco estas ekstreme demokrata. Tio volas diri ke neniuj estas jam antaŭe, surbaze de raso, kredo, sekso aŭ aliaj personaj cirkonstancoj, ekskludita de spiriteco. Tio kompreneble ne signifas, ke spirita pado ne estas ligita al „aristokrataĵ” kondiĉoj, en tiu senco ke ĝi postulas de la disĉiplo malvolvi paŝon post paŝo difinitajn „noblajn” kvalitojn. Tio signifas ja ke neniuj povas esti devigata aŭ malhelpata observi tiujn kondiĉojn. Cetere: ne eblas trudi al si mem pli spiritan vivon. Kiel do iu alia povus devigi nin? Ne estas komisiono kiu decidus, kiu jes kaj kiu ne rajtas ekpaŝi sur spirita pado. Sian taŭgecon kaj maturecon nur ĉiu homo mem difinas.

Vera spiriteco do neniun anticipi ekskludas. Ĝi tion eĉ ne kapablas, same kiel la suno ne povas rifuzi brili por ĉiu egale. Sed ĉu ĉiu lumserĉanto estas preta elpaŝi el sia propra ombro? La demando eĉ estas, ĉu ĉiu serĉanto nepre serĉas lumon? Ofte oni ne sopiras spiritecon, sed aliajn aferojn, kiel certaj psikaj povoj, apartaj fortoj aŭ unikaj „mistikaj” spertoj. Oni deziras „aparteni al io” aŭ



*Pli ol iam antaŭe estas en nia socio granda malsato, je spiriteco, je instruoj kaj instrukcioj, kiuj faros nin fine feliĉaj.*

„ion travivi”, kaj nepre tuj. Ĉu temas pri kontakto kun anĝeloj, adeptoj, dio aŭ la propra supera memo, oni serĉas iun aŭ alian „travivaĵon” kiun aliaj homoj ne konas. Oni iel deziras kontentigon de la persona egoo. Nia motivo ofte ne estas spirita, sed mi-direktita. Tio tamen ankoraŭ ne estas dramo.

Jen la homa kondiĉo: ni fakte estas miksitaj estaĵoj. Niaj motivoj neniam estas centprocente puraj, kaj niaj konsideroj estas laŭdifine mankhavaj. Ni nur provu konsciigi pli bone pri tio kio nin movas. Tiu modesteco atestas pri pli da spirita kompreno ol pensi ke ni jam alvenis antaŭ ol ekiri. Jen okazintaĵo kiu amuze ilustras tiun senripozan serĉon sur la spirita bazar: En usona zen-centro instruisto estis invitita por doni kurson. Ĉe la pordo virino plendis kontraŭ biletkontrolanto: „Mi pagis 100 dolarojn por esti iluminita. Mi volas nun tujan redonon de mia mono.” Sed iluminigo kaj mono havas nenion por fari kune. Spirita riĉo ne akireblas en kursejo aŭ sur foirego.

Ĉar nia kulturo estas tiom superregata de materialismo kaj do havas multan spiritan kaj etikan edukon ofertebla, la pliparto de la homoj ne scias, kiel disigi la lolon disde de la tritiko. Estas do kompreneble, ke multaj serĉantoj faltrafas en la akvokirliĝon de spiritala materialismo kaj psiĥismo, precipe kiam la sola provilo estas ilia propra „sento”. Ĉar pensado estas nespirta. Oni ne plu pristudas kaj prirezonas la aferojn; ne, oni „sentas ke estas bone”. Spiriteco, ja prave, estas pli ol la intelekto, sed tio ne signifas ke *ĉio* kio ne estas intelekta do aŭtomate estas spirita. Se ni fidus nur al nia persona sento kaj krom tio ne uzas aliajn, pli objektivajn direktivojn, plimalpli frue ni eliros trompitaj. La problemo estas ja, ke ni ĉiusekunde „sentas” malsame kaj ke ne ĉiu „sentas” la samon. Fundamentalistoj kaj teroristoj „sentas” ja ankaŭ, ke ili iras laŭ la ĝusta pado. Sen la konduko de la Racio la sento ne povas esti sekura gvidanto. El tio ne sekvas ke spiriteco ekskludas la senton. Niaj sentoj estas esenca elemento de nia

homeco. Ni ne povas funkcii sen sentoj. Ni nek negu nek forpremu niajn sentojn, sed ni lernu ilin kompreni. Ni ankaŭ ne forgesu ke estas diversspecaj sentoj. Estas personaj kaj transpersonaj sentoj, kaj tiuj lastaj neniam estas malraciaj, eĉ ne kiam ili superas la racion. La eminenta budhisto Bhikshu Sangharakshita iam diris: „Ni devas nin gardi kontraŭ la ofta eraro supozi ke per mistiko estas aludata io neracia kaj nelogika. Kiel T. S. Elliot cinike rimarkigas: antaŭ ol oni povas transgrimpi la intelekton, necesas unue posedi intelekton.”


Tamen ni vidas, ke la pli multaj Novpok-aj filozofioj prezentas nur metodojn por senti sin pli sane, por senti sin pli komforte en la revoj de sia iluzia egoo. Sed la lakmusa testo de vera spiriteco estas ĝuste ĝia senkompromisa povo liberigi nin de tiu iluzio, ne tuj, sed kiam ni pro interna bezono konscias ke ne estas alia eblo.

La redakcio.

Christian DECLERCK



# Malkovru Napolon!



Imagu, ke iu esperantisto decidis vojaĝi ekskurs-cele al Napolo. Feliĉe, nun li povas uzi la esperantlingvan gvidlibron de Nicolino Rossi pri la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Kia ĝi estas, taksate el la vidpunkto de diligenta vojaĝanto?

Verŝajne, nia imaga vizitonto de Napolo preferos legi la gvidlibron hejme aŭ en la hotelo, ĉar la libro estas presita sur tro bona papero kaj tial estas iom peza por havi ĝin ĉe si dum marŝoj tra la urbo. La vojaĝanto ankaŭ devas mem zorgi pri urbomapo, ja ĝi mankas en la libro.

La organizado de informoj en la gvidlibro, tamen, estas originala kaj interesa. La leganto komence konatiĝas kun iu fragmento de la napola historio (la antikveco, de la mezepoko ĝis la Renesanco, de la Renesanco ĝis la 18a jarcento, la 19a jarcento kaj la unua duono de la 20a jarcento, post la dua mondmilito) kaj tuj poste kun vidindaĵoj kaj muzeoj, ligitaj



*Feliĉe, nun vi povas uzi la esperantlingvan gvidlibron de Nicolino Rossi pri Napolo.*

kun tiu tempo: konstruitaj aŭ renovigitaj en la indikita periodo aŭ enhavantaj objektojn de tiu epoko. La turisto povas ricevi plenan imagon, kio atendas lin en konkreta muzeo, kiujn sekciojn ĝi havas, kiuj skulptaĵoj kaj pentraĵoj estas aparte interesaj. Vidindaĵoj (plejparte preĝejoj, sed ankaŭ kasteloj, palacoj, vilaoj, teatro kaj botanika ĝardeno) estas bone priskribitaj. Estas indikite, kiam kaj fare de kiu ili estas konstruitaj, kiuj ŝanĝoj okazis poste, kiujn detalojn oni devas atenti. Koncerne preĝejojn, la leganto informiĝas pri la historio kaj strukturo de la konstruaĵo, pri la ornamo de ĝiaj kapeloj. La priskribojn ilustras bonegaj koloraj fotoj.

La subtitolo de la libro estas „Historio, arto, folkloro”, kaj jes, la leganto trovas informojn pri eventoj de la napola historio kaj pri verkoj de famaj artistoj. Tamen, laŭ ni, faktoj pri legendoj, kantoj, tradicioj de napolanoj, kiujn ni subkomprenus sub „folkloro”, nemultas. Al la fama napola kanzono estas dediĉita nur duonpaĝo.

La libro enhavas ankaŭ sekcion pri vizitindaj napolaj ĉirkaŭaĵoj: Pompejo kaj Herkulano, Vezuvio (en la libro „Vezuvo”), kelkaj konataj insuloj kaj urboj. Vere surpriza estas la informo pri la deveno de la nomo de la insulo Kapreo. Aparte entuziasmigas priskribo de la reĝa palaco en Kazerto, kiu instigas tuj

viziti la belegan vidindaĵon (kvankam iom malpli grandan, ol la libro tajperare asertas).

La legadon de tiu gvidlibro ni ne povas nomi facila, la sintakso estas iom peza. Krome, konfuzis nin multloke la aŭtora uzado de prepozicioj, nekutima vortordo, la influo de la itala lingvo (ekzemple, „kvincentska” anstataŭ „de la 16a jarcento”, „precioza” anstataŭ „valora”), troa majuskligo, neakurateco dum tajpado.

Grava zorgo de ĉiu gvidlibro estas pripensita prezentado de originaj nomoj kaj iliaj tradukoj. Eventuala turisto certe devas scii, unuflanke, la originan literumon kaj prononcon de la nomo de muzeo aŭ objekto kaj, aliflanke, la signifon de tiu nomo, almenaŭ proksimuman. Deziratas, ke la aŭtoroj sekvu difinitan sistemon. Bedaŭrinde, tiurilate tiu ĉi gvidlibro ne estas modela.

Do, estas bone, ke esperantistoj nun havas eblon konatiĝi kun la bela itala urbo. Espereble, ankaŭ en aliaj urboj kaj landoj troviĝos entuziasmuloj, pretaj prezenti siajn regionojn gvidlibroforme.

**Anna kaj Mati Pentus**

Nicolino Rossi: *Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj (Historio, arto, folkloro)*. Eld. Napola Esperanto-Asocio, 2008. 192 paĝoj gluitaj. Neniu ISBN indikita.

Prezo ĉe FEL: 12,00 eŭroj + aŭfranko.



## anoncetoj

**La Verda Stelo**, <http://tetrapentos.over-blog.com/> enhavas 3 partojn: 1) Tetrapentos, 2) Stelo, 3) La Ora Stelo. La tria parto estas tradukita al pluraj lingvoj; mi emus doni pli da tradukoj al tiu parto. Se tio interesas vin, iru al <http://tetrapentos.over-blog.com/article-16071723.html>

Se vi tradukos tiun paĝon al via naci-lingvo kaj sendos tiun tradukon al mi, mi pagos vin sendante al vi unu ekzempleron de La Ora Stelo (aŭ Verda Stelo, se vi elektas la ludon, kiu enhavas ĉiujn pecojn verdajn). Antaŭ ol komenci tradukon, bonvolu skribi al [jacques.ferroul@laposte.net](mailto:jacques.ferroul@laposte.net) por scii, ĉu neniuj jam komencis traduki.

**Vizitu IperNity**, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1250 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al [www.ipernity.com/?lg=eo](http://www.ipernity.com/?lg=eo) Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

**"Naturista Vivo"**, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: [jozsef.nemeth@gmail.com](mailto:jozsef.nemeth@gmail.com).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

MONDKULTURA  
SENDEPENDA  
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

[lagazeto@osiek.org](mailto:lagazeto@osiek.org)

<http://www.lagazeto.com>

## La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Jak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)  
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp  
[ikk@free.fr](mailto:ikk@free.fr)

## La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto

LA ONDO  
DE ESPERANTO

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR  
aere 43 EUR  
rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine


SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

# MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...



Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte  
de Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)